
Paiva Netto skribas “La Jarmilo de Virinoj”

www.bonavolo.com

# BONA VOLO Virino




# Solidara Civitaneco

De 60 jaroj Legio de Bona Volo kunlaboras por plibonigi la vivkvaliton de malriĉaj familioj. Danke al kampanjoj kaj programoj de la Institucio, miloj da virinoj reakiras memestimon, liberigas sin el enhejma perforto kaj konkeras financan sendependecon.


Aqui tem Light.
www.light.com.br


Aqui também.
Light
O RIO É LIGHT


# La Jarmilo de Virinoj



Photos.com



“Virino, tiu flanko plej ĉarma de la Homaro, distingiĝas kiel la fundamento de ĉiaj grandaj faroj. Tio, kio fizike nin konsistigas, tio estas formita en ŝia ventro (...). Niaj unuaj paŝoj cele al disvolviĝo de civitaneco estas gvidataj de ŝi, nin kondukante per la manoj. La monda stabileco komenciĝas en la koro de infano. Tial en LBV, de multaj  jaroj, ni aplikas la Pedagogion de Amo.”



João Preda

José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radiprelegganto, verkisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Lernanto Eminenta de la Kolegio Petro la Dua, li estas efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Per prava omaĝo al la homa estulo, kiu pro siaj multaj virtoj havas la naturdonon nin venigi al la vivo, mi apartigis pecojn de mia libro *La Kapitalo de Dio*, Eldonejo *Elevação*. Antaŭ ol ilin transkribi, mi volas reliefigi, ke plurmaniere eblas esti patrino, laŭ tio kion mi skribis en la gazeto *Correio Braziliense*, en 1987: eĉ kiam ne temas pri ia samsanga aminklino, ĉar ekzistas aliaj sublimaj manieroj tio esti, inkluzive naski grandajn realigojn favore al la Homaro. Mi esperas, ke vi ilin ĝuos.

Rimarkinda estas la virina sentokapablo ankaŭ por la transcendaj aferoj. Celante la perspektivojn por la venontaj jaroj, kiam pro instinkto de ekzistado la konsciencoj povos montriĝi pli fekundaj pri ĉio, kio koncernas la moralan kaj spiritan altiĝon, mi — en pluraj okazoj kiam mi min turnis al la popolo, dum tiuj du tagoj, en la Templo de Bona Volo, en la sidejo de ParlaMundi de LBV kaj en la Placo Alziro Zarur*[1],

*[1] **Placo Alziro Zarur** — Iniciato de Paiva Netto kiu kalkulis je la kunlaboro de la Legiana Geparo **Noys** kaj **Haroldo Rocha**, nuntempe respondeculoj de LBV en Portugalio.


Arkivo BV

**PARTA VIDAĴO DE LA MEMORINDA "BONVENON, JARO 2000!"**
Antaŭ la Ekumena, Arkitektura Ensemblo de LBV, en Braziljo/DF, Brazilo, okazis la grandioza Kongreso, al kiu ĉeestis, laŭ oficialaj informoj, ĉirkaŭ 200 mil personoj, el ĉiuj regionoj de Brazilo kaj el alilandoj, por saluti la alvenon de la jaro 2000. Sub la gvidado de Paiva Netto, la ĉeestantaro kunvenis por la monda Paco.


Informado

Heloneida Studart

en Braziljo/DF (Brazilo), antaŭ la Ekumena, Arkitektura Ensemblo de Bona Volo — invitis tiujn, kiuj min privilegiis per sia estimo, en 2000, bonvenigi la Jarmilon de Virinoj.

Tiam mi atente spektis la intervjuon donatan al TV Bona Volo de la karmemora verkistino **Heloneida Studart** (1932-2007), kiu paroladis pri la elstara rolo, kiun Virinoj prenas sur sin rilate la plibonigon de la vivkvalito:

*"Feminismo daŭre estas la sama, sed riĉigita de novaj postuloj. Parto el ĝi, precipe en la Unua Mondo, entreprenas nun lukton kontraŭ malriĉeco, kreskanta fenomeno, kiu, malsame al tio, kion antaŭe oni povus pensi, senkompate kaj kruele atingas multe pli la virinojn ol la virojn. La virinoj laboras hejme kaj eksterhejme kaj devas prizorgi en tuja momento, vidalvide, ĉiajn necesbezonojn de sia familio (...). Ili flegadas malsanan infanon, al kiu mankas kuraciloj, maltrankviliĝas pro tio, ke ili ne povas havigi vitaminojn al siaj idoj, nek havas rimedojn por aĉeti fruktojn, pliofte devas reguligi kontojn nepagitajn...*

*"UN prezentas statistikon montrantan ke malriĉa virino laboras pli ol viro, ĉar ŝi agas ĉe pluraj frontlinioj: en la hejmo, surstrate, en la entrepreno, fine, ili estas longtempe aktivaj ĉiutage. Ordinare, kiam ili eliras por la laboro, jam sin dediĉis du aŭ tri horojn al la servoj de la hejmo, kaj kiam ili tien revenas ankoraŭ havas plenumendajn taskojn. La ampleksigo de ilia spaco por libertempaj aktivadoj, kun malpliiĝo de ilia laborperiodo estas postulo de la nomata nova feminismo".*

Trafite, kara Heloneida.

## Virino kaj la stabileco de la mondo

Neeble haltigi — konforme ankoraŭ nuntempe kelkaj kaŝintence volas — ilian elstaran kaj fruktodonan partoprenon en la diversaj sektoroj de la socio por ke la progreso plene sukcesu per belega kampanjo por elaĉeto de civitaneco, kiel prelegis d-ino Heloneida. Alvoko kompreneble inkludanta tiujn, kiuj administras la politikajn, registarajn agojn, ĉe kiuj estas gravega la renoviga stimulo de la Ekumena Spiritualeco, ĉar kontraŭe ĝia efikeco ne estos tia, kian sopiras la popola volo.

Virino, tiu flanko plej ĉarma de la Homaro, distingiĝas kiel la fundamento de ĉiaj grandaj faroj. Tio, kio fizike nin konsistigas, tio estas formita en ŝia ventro (...). Komponantoj de la virina sekso fariĝas pliinflua konsistaĵo por la postvivado de la bonaj idealoj. Stabilaj organizacioj kalkulas je firmstaraj virinoj. (...) Tie ĉi mi celas emfazi kiom esenca estas por la homa **evoluo** kaj por la planeda **sekureco** la misio de Virino (...). Niaj unuaj paŝoj cele al disvolviĝo de civitaneco estas gvidataj de ŝi, nin kondukante per la manoj. **La monda stabileco komenciĝas en la koro de infano.** Tial en LBV, de multaj jaroj, ni aplikas la Pedagogion de Amo*2.

## Estas multo por lerni el nia proksimulo

En *Tutmondigo de la Frata Amo*[*3], mesaĝo adresita al UN, en 2007, mi atentigis:

Nun pli ol iam iĝas tiel necesega kunigi la strebojn de mediprotektantoj kaj iliaj kontraŭantoj, samkiel de laboristoj, entreprenistoj, ekonomiistoj, profesiuloj pri amaskomunikiloj, laboristoj el sindikatoj, politikistoj, militistoj, advokatoj, sciencistoj, religiuloj, skeptikuloj, ateistoj, filozofoj, sociologoj, antropologoj, artistoj, sportistoj, instruistoj, kuracistoj, lernantoj, dommastrinoj, familiestroj, barbiroj, manikuristoj, taksiistoj, stratbalaistoj kaj aliaj segmentoj de la socio, en tiu batalado kontraŭ malsato kaj protektado de vivo sur la Planedo. La temo estas drama kaj ĝiaj perspektivoj tragikaj. Pro la samaj kialoj urĝas la firmigo de iu ekumenismo kiu superas barojn, mildigas malamikiĝojn, starigas interŝanĝadon de spertoj kapablaj stimuli tutmondan kreemon, kiu konfirmas la valoron de socia kaj homa kunlaborado, kiel ekzemple ĉe popularaj kooperativoj, en kiuj virinoj ludas gravan rolon **pro la fakto ke ili forte kontraŭstaras malŝparemon. Estas multo por lerni unuj de aliaj.** Tute malsama vojo sendube estas tiu de perfortado, de brutaleco, de militoj, kiuj tra la mondo invadis hejmojn. **Resume**: kiam ne plu estos aroganteco aŭ antaŭjuĝoj, tiam eblos ĉiam ion justan kaj bonan ensorbi el ĉiuj eroj de tiu ĉi ampleksa "Arkeo de Noa", kiu estas la nuntempa kompakta mondo.


Arkivo BV

Simone de Beauvoir

La franca verkistino kaj filozofino **Simone de Beauvoir** (1908-1986) mirinde sin esprimis:

*"— Ne estas eĉ unu colo sur mia vojo kiu ne koncernas la vojon de aliulo".*

(...)

## La miraklo de dommastrinoj

**Ne estas plibona financisto ol familiestrino**, dommastrino kiu devas prizorgi siajn idojn multefoje





LA VIRINO ĈE LA RIPARO DE LA NACIOJ

Reprodukto de la dokumento ellaborita de LBV kaj tradukita de Unuiĝintaj Nacioj al ties ses oficialaj lingvoj.

---

[*2] **Pedagogio de Amo** — Temas pri unu el la bazoj de la pedagogia propono (ankaŭ konsistigata per la Pedagogio de la Ekumena Civitano) diskonigata de Paiva Netto, kiu proponas novan modelon de lernado, per kunesto de cerbo kaj koro. Ĉi tiu eduka metodologio estas sukcese aplikata en la instruada reto kaj en la sociedukaj programoj starigitaj de Legio de Bona Volo, en Brazilo kaj alilande. Ambaŭ *"baziĝas sur la valoroj devenantaj de la Frateca Amo, kiujn surtere alportis pluraj iluminitaj homoj, precipe Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatisto"*, kiel certigas la kreanto de la propono, la edukisto Paiva Netto. Laŭ la Pedagogio de Amo, la celo estas la ĝisdekjaraj infanoj, aligante senton al la disvolkapablo de la etuloj, tiel ke kareso kaj amemo plektiĝu kun ilia scipovo kaj vivkondiĉoj, inkluzive de ilia lerneja vivo. Laŭlonge de tiu lernado-procezo, la Pedagogio de la Ekumena Civitano estas direktita al la edukado de junularo kaj plenaĝuloj, tiel ke ili decidu vivi laŭ la Ekumena Civitaneco, bazita sur la tutplaneda Solidareco.

[*3] **Tutmondigo de la Frata Amo** — Eldonita en Esperanto, en la portugala, franca, angla, hispana, itala kaj germana lingvoj, la revuo estis speciale alportita de Paiva Netto al la kunsido de *High-Level Segment* 2007, de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok) de Unuiĝintaj Nacioj — ĉe kiu LBV havas statuson de ĝenerala konsultanto —, realigita en *Palais des Nations*, nome la centra sidejo de UN en Ĝenevo (Svislando). Ĝi estis varme akcepitita de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon**, okaze de lia vizito al la eksponbudo de Legio de Bona Volo dum la evento. La sekretario prezentis sian apogon al LBV per subskribo de la kovrilo de la revuo kaj esprimis bondezirojn pri multe da sukceso al ĉiuj agoj entreprenitaj de la Institucio.



Arkivo BV

Mohammad Ali Jinnah


per eta buĝeto, farante verajn miraklojn pri kiuj ni ĉiuj estas atestantoj, disde la plej influa ministro pri Finacoj ĝis la plej simpla civitano. Ĉefe sur la ekonomia kampo, kiu ne povas fali en la gravan krimon agadi for de la spirito de Solidareco, estas baza la agado de Virino.

**Mohammad Ali Jinnah** (1876-1948), juristo kaj politikisto, fondinto de Pakistano, okaze de diskurso kiun li prezentis en 1944 ĉe Muslim University Union, substrekis:

*"— Neniu nacio povos glore elstariĝi, escepte se virinoj kunestos flanke ĉe flanke kun la registaroj".*

## La Animo de la Homaro

Por fini, mi prezentas al vi malgrandan tekston el alia paĝo — "Virino ĉe la riparo[*4] de la nacioj" — kiun mi same sendis al UN, en nova oportuno, kaj estas de ĝi tradukita al ties ses oficialaj lingvoj okaze de la 51-a Kunsido pri la Situacio de Virino, en 2007, en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. La evento ĉiam kalkulas je la ĉeesto de LBV, kiu sendas sian parolon de Paco al la delegitaroj en la mondo, kiel denove okazas ĉijare:



Arkivo BV

Charles McIver

La rolo de Virino estas tiel grava, ke eĉ kun ĉiaj malhelpoj de la maskleca kulturo, neniu organizaĵo volanta postvivi – ĉu ĝi estu religia, politika, filozofia, scienca, entreprenista aŭ familia — povas rifuzi ŝian apogon. Nu, favorata de la Dia Inspiro, Virino estas la Animo de ĉio, estas la Animo de la Homaro, estas la bona radiko, la bazo de la civilizacioj, la defendo de la homa ekzistado. Kia patrino dezirus vidi sian filon mortinta en milito? Ve al ni, la viroj, se ne estus la klerigitaj, inspiritaj kaj prilumitaj virinoj!

Ĉi tiuj niaj asertoj trovas apogon en tiuj de la usona edukisto **Charles McIver** (1860-1906), kiu diris:

Kelkaj el la edukistinoj de la lernejoj de Legio de Bona Volo



*"— La pli ŝpara, facila kaj trafa vojo al la tutmonda edukado estas eduki la virinojn, tiujn kiuj iĝos la patrinoj kaj instruistinoj de la estontaj generacioj".*


Ni diru la veron: neniu viro realigos ion vere profitan favore al Paco se iel li ne kalkulos je la virina inspiro. Fakte, *"se oni edukos viron, oni edukos individuon; sed se oni edukos virinon, oni edukos familion".* Ĝuste, McIver.

(...) ■

---

*4 **Virino ĉe la riparo de la nacioj** — En la portugala lingvo, ĝenerale la vorto "conCerto" (kun "c") signifas muzikprezentadon, akordon (inkluzive politika), harmonion. Siavice "conSerto" (kun "s") havas la signifon de reformo, riparo, restarigo. Jen la kialo de la klarigo de Paiva Netto en la komenco de lia artikolo: *"Antaŭ ĉio mi devas klarigi al vi pri la vorto 'conSerto', skribita per '**S**' ĉe titolo de ĉi tiu artikolo. Ne temas pri eraro aŭ mistajpo: temas ja pri riparo, ĉar kiel la mondo troviĝas sub preskaŭbrulado pro la tutmonda varmiĝo, pli bone estas, ke la geuloj interfratiĝu, kunigu siajn fortojn kaj urĝe faru la riparon de tiu, kiu minacas rompiĝi, ĉar male ni ĉiuj eble fine kuiriĝos atomkerne aŭ klimate en grandega kaserolo: la planedo, kie ni vivas. (...) Ĉi tio sen mencio de la minacanta bioterorismo".*

# BONA VOLO *Virino*





**4** Mesaĝo de Paiva Netto
**11** Tutmonda Epidemio
**16** Anne Frank
**17** Asha-Rose Migiro
**18** Bibi Ferreira
**19** Cecília Meireles
**20** Eleanor Roosevelt
**23** Gabriela Mistral
**26** Irena Sendler
**27** Maria Barroso
**28** Patrino Tereza el Kalkuto
**30** Maria Luiza Viotti
**31** Maria Quitéria
**32** Maurren Maggi
**33** Shirin Ebadi
**34** Tomie Ohtake
**35** Wangari Maathai
**37** Omaĝo al Zilda Arns
**38** Socia Laboro — LBV: Ekvacio de Amo
**45** Speciala — Hejma perforto kontraŭ Virino



ELEVAÇÃO

BONA VOLO *Virino*

SPECIALA ELDONO
Finpretigo: 4/4/2010

Nepolitika kaj senpartia revuo pri Ekumena Spiritualeco

Eldono ankaŭ disponebla angle, france, hispanlingve kaj portugale

BONA VOLO estas publikigaĵo de IBV-oj, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita sub n-ro 18166, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco de Assis Periotto - MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriana Rocha, Adriane Schirmer, Aline Portel, Alexandre Rueda, Ana Paula de Oliveira, Andrea Leone, Aneliése de Oliveira, Angélica Periotto, Carolina Dutra, Charles Viana, Cida Linares, Daniel Guimarães, Danilo Parmegiani, Enaildo Viana, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, Josué Bertolin, Leila Marco, Letícia Rio, Luci Teixeira, Maria Aparecida da Silva, Maria Corina Rocha, Natália Lombardi, Neuza Alves, Patrícia Maria, Paula Suelí, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Sarah Jane, Silvana Bosso, Silvia Ligieri, Thaís Afonso, Valéria Nagy, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri Baptista.

**GRAFIKA PROJEKTO:** Helen Winkler • **KOMPOSTADO/KOVRILO:** Felipe Tonin

**PRESADO:** Mundial Artes Gráficas

**ADRESO POR KORESPONDO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • CEP 01134-050 • São Paulo/SP • Tel.: (+5511) 3225-4971 • Caixa Postal 13.849 • CEP 01206-970 www.bonavolo.com / Retadreso: esperanto@bonavolo.com

La revuo BONA VOLO Virino ne respondecas pri konceptoj kaj opinioj el la subskribitaj artikoloj.


## *Al la leganto*

Ĉi tiu speciala eldono estas simpla omaĝo de Legio de Bona Volo (LBV) al ĉiuj virinoj, al la anonimaj kaj al tiuj kiuj elstariĝas sur la diversaj kampoj de la homa agado. Al ili, kiuj pli kaj pli dividas kun la viroj la hejmtaskojn kaj la plej gravajn decidojn favore al la Homaro.

La virina Animo, ĉi tie reprezentita per la biografioj de esceptaj virinoj, montriĝas kapabla kontribui por la solvo de la plej gravaj problemoj hodiaŭe afliktantaj la popolojn. Malsato, militoj, klimataj ŝanĝiĝoj kaj tiom da aliaj defioj postulas kompetentecon, kareson, kuraĝon, laborforton, decidemon kaj Amon, karakterizaj aspektoj de Virinoj.

Kiel emfazas la ĵurnalisto Paiva Netto, direktoro-prezidanto de LBV, en sia aparta mesaĝo titolita " La Jarmilo de Virinoj":

*"Virino, tiu flanko plej ĉarma de la Homaro, distingiĝas kiel la fundamento de ĉiaj grandaj faroj. Tio, kio fizike nin konsistigas, tio estas formita en ŝia ventro (...). Komponantoj de la virina sekso fariĝas pliinflua konsistaĵo por la postvivado de la bonaj idealoj. Stabilaj organizacioj kalkulas je firmstaraj virinoj. (...) Tie ĉi mi celas emfazi kiom esenca estas por la homa* ***evoluo*** *kaj por la planeda* ***sekureco*** *la misio de Virino. (...) Niaj unuaj paŝoj cele al disvolviĝo de civitaneco estas gvidataj de ŝi, nin kondukante per la manoj.* ***La monda stabileco komenciĝas en la koro de infano.*** *Tial en LBV, de multaj jaroj, ni aplikas la Pedagogion de Amo".*

La revuo malfermas spacon ankaŭ por grava pripenso pri enhejma perforto kontraŭ virino kaj pri la egaleca divido de rajtoj kaj prirespondoj inter la seksoj. Alia elstaraĵo estas la raportaĵo kiu ilustras plurajn el la vojlinioj prilaboritaj de LBV celantaj krei oportunojn por socia valorigo de virinoj vivantaj en malriĉaj regionoj.

Bonan legadon!

# LA SUKCESO DE VIA EVENTO ESTAS ĈI TIE!



## PARLAMUNDI DE LBV







Apud la Templo de Bona Volo staras ParlaMundi de LBV: kun sia privilegia arkitekturo, ĝi estas loko kun internacia nivelo por eventoj je malgranda, meza kaj granda dimensioj. Kvinetaĝa, klimatizita konstruaĵo, aŭditorioj por 100 (Tom Jobim), 200 (Austregésilo de Athayde) kaj 500 homoj (José de Paiva Netto), nobla salono, ĉambroj por trejnkunsidoj kun 30, 60 kaj 80 sidlokoj, biblioteko, studareoj, speciala bufedo kun kafoservo, koktelo, *brunch* kaj vespermanĝo, grafik- kaj komputilservoj kun eblo al disvastigo de eventoj, modernaj aŭdvidaj rimedoj.

Fenix Eventos

SGAS 915 - Lotes 75/76 | 1-a etaĝo de ParlaMundi de LBV | Braziljo/DF | CEP 70390-150

Telefonoj.: (+55 61) 3245-8420 / 3346-1836 | Fakso: (+55 61) 3345-1050 | Retejo: fenix.eventos@terra.com.br | www.parlamundi.com.br.



# Tutmonda Epidemio


**Okaze de la 53-a Kunveno pri la Situacio de Virino, UN taksas la evoluon de HIV/aidoso kaj proponas samrespondecajn agadojn inter la seksoj cele al zorgoj pri la malsano.**


Natália Lombardi

Fotoj: Adriana Rocha kaj Danilo Parmegiani

La rapido per kiu la viruso HIV plivastiĝas en malriĉaj regionoj kaj la fakto pri tio, ke la epidemio ne montras signojn de retroiro en aliaj landoj, maltrankviligas aŭtoritatulojn kaj popolojn. Laŭ la Ministrejo pri Sano, de 1980 ĝis ĉirkaŭ la mezo de 2007 estis registritaj en Brazilo 474.273 kazoj de tiu akirita imun-deficita sindromo. Ankoraŭ sciigas la Ministrejo, laŭ paso de la tempo, ke la proporcio inter la seksoj grade malpliiĝas. En 1985 registriĝis 15 kazoj ĉe viroj kontraŭ unu ĉe la virina grupo. Freŝdataj donitaĵoj montras ke la rilato malkreskis, nun la diferenco estas 1,5 kontraŭ 1 inter la seksoj.

La marton de 2009, okaze de la 53-a Kunveno de la Komisiono pri la Situacio de Virino (angle, CSW) ĉirkaŭ du mil internaciaj reprezentantoj de







**MESAĜO DE LBV DISTINGIĜAS EN UNUIĜINTAJ NACIOJ**

(1) S-ro **Michel Sidibé**, plenuma direktoro de UNAIDS kaj ĝenerala subsekretario de Unuiĝintaj Nacioj, ricevas el la manoj de Mariana Malaman, el LBV, la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo.* (2) Ambasadoro **Hilario Davide Jr.** (dekstre), estro de la Filipina Misio en UN apud Danilo Parmegiani, el LBV. (3) Brazila delegitaro: **César Bonamigo**, membro de la Brazila Misio en UN; **Janete Mazzieiro**, plenumsekretariino de la Forumo pri Virinoj en la Merkato Komuna de la Sudo (Mercosul); d-ino **Lourdes M. Bandeira**, porparolanto de la Brazila Delegitaro en la evento kaj subsekretariino pri Planado de la Speciala Sekretariato de Strategioj por Virinoj (reprezentanto de la Ministrino **Nilcéia Freire**); d-ino **Cecília Bacellar Sardenberg**, antropologino ĉe la Centro de Interfakaj Studoj pri Virino – NEIM, en la Federacia Universitato de Bahia,

la civila socio — inter kiuj tiuj de Legio de Bona Volo, kiu akiris statuson de ĝenerala konsultanto en Ekosok (Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN) ekde 1999 — kaj delegitaroj de la ŝtatoj-membroj de Unuiĝintaj Nacioj kunvenis en la novjorka sidejo de la organizo, en Novjorko (Usono), por pridiskuti la egalecan disdividon de respondecoj inter la seksoj kaj la zorgojn rilate al HIV/aidoso. La evento reasertis la Programon de Agado kaj Deklaro de Beijing (Ĉinio) kaj ratifikis la neceson forigi iujn ajn formojn de diskriminacio kontraŭ Virino.



S-ino **Arleen Elias** (maldekstre), el Care and Hope Women's Center (usona NRO, kiu havigas helpon por ke virinoj ne abortigu), kaj Adriana Rocha, el LBV.

## Batalo por la vivo

La adopto de rimedoj por helpi malpliigi la nombron da individuoj infektitaj de HIV-viruso, speciale ĉe virinoj, ĉefrolis en la debatoj de tiu 53-a eldono de CSW. Tiu celo devas plivastiĝi trans la afrikan kontinenton, kie la situacio de la malsano pli gravas, atingante ankaŭ riĉajn landojn, kiel Usono, kaj efektiviĝas kiel tutmonda respondo al la problemo.

Cetere LBV subtenas en Usono laboron celantan la preventon kaj vastan konsciigon pri aidoso, partnere kun la Universitata Hospitalo de Nov-Ĵerzejo. La prezidantino de organizaĵo, kiu helpas seropozitivulojn en Afriko, la senegalanino **Adja Mame Diarra Seck Wade**, kredas je la vivo: *"Mi estas persono kun HIV, kiu havas esperon. Ekde mia malsano-infektiĝo la aferoj fariĝis tre malfacilaj, sed mi provas vivi optimisme cele helpi tiujn, kiuj same malsanas kiel mi".*

## Justa omaĝo

La partoprenantoj en la UN-evento ricevis el la manoj de reprezentantoj de LBV la specialan

Rosana Bertolin, el LBV, interparolas kun s-ino **April Hymen** (meze), direktorino de Client Services of Pregnancy Center, kaj s-ino **Millie Lace** (dekstre).



S-ino **Fatou Mbye**, prezidantino de la Nacia Konsilio de la Virino en Gambio, kune kun Mariana Malaman.



S-ino **Homa Mungapen**, membro de la Maŭricia Delegitaro kaj kunordiganto de projektoj de la Konsilio de la Religioj kontraŭ aidoso.








Brazilo, kune kun Adriana Rocha, el LBV. Vizitantoj de la Templo de Bona Volo, Janete kaj s-ino Lourdes reliefigis, ke la monumento helpas al la demandoj pri Paco kaj familia harmonio. La brazila prezentado rilatis al la Leĝo Maria da Penha kaj la partoprenantoj ĝojis legi artikolon pri ĝi verkita de la direktoro-prezidanto de LBV. (4) Conceição de Albuquerque kaj la prezidanto de la 53-a CSW 2009, **Olivier Belle**, el la belga delegitaro.




publikigaĵon BOA VONTADE *Mulher* [BONA VOLO *Virino*] (eldonitan angle, portugale kaj hispane), per kiu oni faras justan omaĝon al la virina animo kaj ties kapablo superi kaj kontribui al solvo de gravaj problemoj kiuj afliktas la popolojn. *"Mi deziras al vi kuraĝon, ĉar vi havas gravan mision, nome la transdonon ne nur de informoj, sed de edukado de la homa raso"*, eldiris la reprezentantino de la Konsilio de la Religioj kontraŭ HIV/aidoso en Maŭricio, **Homa Mungapen.**

La psikologino **Martha Gallahue**, reprezentantino de *National Service Conference of the American Ethical Union* ĉe UN, substrekis: *"Tiu revuo estas belega. Mi estas impresita pro la diverseco de ĝia enhavo. Per ĝi oni honoras ne nur la tradicion de* ***Eleanor Roosevelt****, sed tiun de aliaj admirindaj virinoj kiel* ***Asha-Rose Migiro*** *kaj* ***Wangari Maathai****, kaj ĝi temas do pri mirinda priskribo de malnovaj kaj novaj bataloj, kun implicoj al la estonteco"*. Kaj kompletigis Martha: *"Konstateblas nekredebla evoluo rilate al la aliiĝo de povo de regado al tiu de kunlaboro. Kaj kompreneble la revuo montras, ke tiuj gravaj virinoj estis povaj, sed ankaŭ ekstreme kunlaboraj"*.

## Amiko de idealo

BONA VOLO kaptas la okazon por omaĝi la pliaĝan konsultiston ĉe Unuiĝintaj Nacioj, **Joseph Owondo**, el Gabono (Afriko). Li estis en la flugo 447, de Air France, kiu ekiris de Rio-de-Ĵanejro/RJ la 31an de majo 2009 survoje al Parizo, kaj falis en la Atlantikan Oceanon.

Owondo ĉiam montris simpation pri la laboro de Legio de Bona Volo. Tial, la distingo fare de la direktoro-prezidanto de la Institucio, Paiva Netto, en sia artikolo "Fido kaj doloro", per kiu li rememorigis tiun amikecon: *"Ekde la akcidento de la flugo 447, ni tie ĉi en LBV preĝadas por tiuj, kiuj estis prenitaj de la destino, kaj kondolencas iliajn karajn familianojn. Ankaŭ valora amiko je idealo, la gabona konsultisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Joseph Owondo, kiu estis volontula kunhelpanto de nia laboro en UN, estis en tiu flugo. Por tiuj, kiuj forlasis nin tiel subite, mi petas al Dio protekton kaj spiritan konsolon por iliaj animoj. Kie ajn ili estu, ĉar la mortintoj ne mortas, akceptu niajn pensojn de amo kaj sereneco".*

S-ino **Ana Milagros Martínez** (meze), el la Kuba Delegitaro, kune kun la reprezentantoj de LBV Mariana (maldestre) kaj Conceição de Albuquerque (dekstre).



S-ino **Michele Fedoroff** (maldekstre), adjunkta eksestrino de la Sekcio de NRO-j ĉe Ekosok, apud Adriana Rocha, el LBV.




La porparolanto de la delegitaro de Senegalo en la 53-a Kunveno de la Komisiono pri la Situacio de Virino, s-ino **Awa Dieng**, kaj la karmemora konsultisto de UN **Joseph Owondo**, el Gabono, kun la revuo BONA VOLO Virino. Maldekstre, Rosana Bertolin, el LBV.






Danilo Parmegiani, el LBV, donacas la revuon *BONA VOLO Virino* al la ano de la Plenuma Komitato de la Konferenco DPI/NGO, **Richard Jordan** (maldekstre).




S-ino **Mazal Renford** apud s-ino **Asha-Rose Migiro**, ĝenerala vic-sekretariino de UN, unu en la omaĝitoj, kies biografio estis publikigita en la revuo *BONA VOLO Virino*.



Meze, **Aparna Mehrotra**, direktorino de la Departemento pri Fokusaj Debatoj por Virino ĉe UN, kune kun Danilo Parmegiani kaj Adriana Rocha, el LBV.

## Reedukado

La usonano **Richard Jordan**, membro de la Plenuma Komitato de la Departemento pri Publika Informado (DPI/NGO), montris sin entuziasma pri la proponoj de la ĉefgvidanto de LBV por progresigo de frateca socio komencanta de urĝa reedukado fare de la popoloj. *"Nepras, ke ni revenu al la vortoj de José de Paiva Netto kaj lia Pedagogio de Amo. Mi vizitis Brazilon kaj vidis kion LBV faras; mi ja scias do kia estas la laboro, mi travivis ĉion ĉi. Estis mirinde. Mi ĝojas esti intervjuata kaj kundividi miajn rememorojn pri mia vizito al Rio-de-Ĵanejro kaj al Belo Horizonto. Koran dankon. Vi faras bonegan laboron. Dio benu ĉiujn!"*, komentis Jordan.

La israelanino **Mazal Renford**, direktorino de *Golda Meir Mount Carmel International Training Center* kaj ankaŭ ĉeestanta la eventon, rigardas Edukadon kiel esencan demandon, kaj reliefigas: *"Nepras, ke ni kunligu ĉiujn programojn kaj kunigu la personojn je ĉiuj niveloj cele superi la obstaklojn kaj vere praktiki la rekomendojn proponitajn en la Konferenco de Beijing. El dekdu krizaj kampoj, ok estas rekte konsiderataj de la civila socio en Izraelio"*. La organizaĵo, kiun ŝi gvidas, agadas cele al povigo de virino, ofertante profesian formadon kaj trejnadon pri diversaj fakoj.

La psikologino **Martha Gallahue**, reprezentanto ĉe UN de NRO National Service Conference of the American Ethical Union, apud Danilo Parmegiani, el LBV.



Kiel laŭdas la verkisto Paiva Netto, per artikolo de sia aŭtoreco publikigita en la revuo BONA VOLO Virino, titolita "La Jarmilo de la Virinoj": *"Virino, tiu flanko plej ĉarma de la Homaro, distingiĝas kiel la fundamento de ĉiaj grandaj faroj. Tio, kio fizike nin konsistigas, tio estas formita en ŝia ventro (...). Tie ĉi mi celas emfazi kiom esenca estas por la homa* ***evoluo*** *kaj por la planeda* ***sekureco*** *la misio de Virino (...). Niaj unuaj paŝoj cele al disvolviĝo de civitaneco estas gvidataj de ŝi, nin kondukante per la manoj.* ***La monda stabileco komenciĝas en la koro de infano****. Tial en LBV, de multaj jaroj, ni aplikas la Pedagogion de Amo. (...) Kiel mi skribis en la ĵurnalo* Folha de S.Paulo *en 1987, Virino,*

(1) S-ino **Chantal Kambiwa**, vicprezidantino de *Socialist International*, kun sia filino, Nelly. (2) S-ino **Mballa Cecile**, unua sekretariino de la kamerunia misio en Unuiĝintaj Nacioj, apud Conceição de Albuquerque (maldekstre), el LBV.







Delegitaro de Sudafriko. Maldekstre: d-ino **Manto Tshabalata-Msimang**, prezidenteja Ministro de Sudafriko.





Rosana Bertolin donacas la revuon BONA VOLO Virino al reprezentantoj de la sudana registaro, kiu interesiĝis pri la laboro de LBV kaj nepre volis interŝanĝi vizitkartojn cele plu informiĝi pri la aktivadoj de la Institucio.




La porparolanto de Vatikano ĉe Unuiĝintaj Nacioj, s-ino **Annalisa Sacca**, elvortigis sian ĝojon, vidante en la revuo la omaĝon faritan de la direktoro-prezidanto de LBV al **Patrino Tereza de Kalkuto**.



S-ino **Shazia Marri** (maldekstre), pakistana ministrino, apud la juna legianino Mariana Malaman. En la okazo, la reprezentantino de Pakistano ricevas la publikigaĵojn de LBV.




Arkivo BV

Legio de Bona Volo okazigas plurajn Kampanjojn por Valorigo de Vivo. Unu tia ekzemplo estis la marŝado realigata de la Institucio sub la slogano kreita de Paiva Netto: *"Aidoso – la viruso de antaŭjuĝo pli minacas ol la malsano"*. La agado mobilizis 200 mil personojn en la ĉefurbo Rio-de-Ĵanejro, en Brazilo, la 1-an de decembro 1996.

*integriĝinta al Dio, estas la bazo de la civilizacio".*

La fakto ke la virina animo estas reprezentata en la publikigaĵo per eksterordinaraj biografioj pravigis la distingaĵon. Ekzemple, la komento farata de **Norah Winyi**, el Kenjo, kiam ŝi konatiĝis kun la historio pri vivo kaj batalo de sia samlandanino Wangari Maathai, raportita en tiu ĉi eldono de la revuo: *"Mi estimas tion, ke vi rekonis kaj valorigis malsamajn virinojn en la mondo, kiuj kontribuis al fundamentaj transformiĝoj. Vi rekonis kenjaninon, tiun personon kiu komencis per malgrandaj agoj, sed grandaj je signifo, kaj kapablis altiri homojn por enkonduki tion, kion ŝi ne sukcesus fari sola".*

Sur la lastaj paĝoj de BONA VOLO Virino, la leganto trovas seriozan penson pri perforto hejma kaj familia kontraŭ la Virino. Malakcepto de tia konduto estis reasertita de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj okaze de parolado en la plena kunsido. Laŭ **Ban Ki-moon**, la ago karakteriziĝas kiel *"krimo kontraŭ la Homaro. (...) Temas do pri atako kontraŭ ni ĉiuj, en la fundamento de la civilizacio".*

En ĉiuj tagoj de la evento, LBV prezentis al la partoprenantoj raporton kaj ekzemplojn pri la diversaj sociedukaj agadoj realigataj favore al virinoj. Tiun sperton oni povis vidi en la budo de LBV per prezentado de la programoj kaj projektoj realigataj favore al egaleco por rajtoj kaj devoj inter la seksoj.

*"De longa tempo ni rilatiĝas kun Legio de Bona Volo, kaj dum tiu periodo mi atentas pri ĝia laboro favore al la Virino. Mirindas ĉe LBV tio, ke ĝi venigas Amon al ĉio, ĉiam. Mi konstatis, ke tio estas skribita en la bela revuo lanĉita de Paiva Netto. Tio estas la plej grava elemento rilate al la temo pri egaleco inter la seksoj"*, diris la usonanino **Sharon Hamilton-Getz**, prezidantino kaj fondinto de Projekto Harmonio kaj Monda Paco. ■



Sharon Hamilton-Getz





(1) S-ino **Dunstanette Macauley**, direktorino de Zonta (delegitaro de Liberio), kaj s-ino **Norah Winyi**, plenuma direktorino de *African Women's Development and Communication Network* (delegitaro de Kenjo), kaj Adriana Rocha, el LBV. (2) S-ino **Elza Pais**, el la prezidantejo de la Konsilio de Portugaliaj Ministroj kaj prezidantino de la Komisiono por la Civitaneco kaj Egaleco inter Seksoj, kune kun Sâmara Malaman (maldekstre) kaj Danilo Parmegiani, el LBV.

memore

# Anne Frank

# Taglibro kiu ne ĉesas paroli

Natália Lombardi

Dum vivis en rifuĝejo kun sia familio kaj geamikoj, la juna judino Anneliese Marie Frank, alnomita **Anne Frank** (1929-1945), verkis unu el la plej kortuŝaj raportoj pri la Juda Gentmurdo. *"Ĉirkau dek jaroj post finiĝo de la milito, certe ŝajnos strange kiam oni rakontos kiel ni, judoj, vivis, manĝis kaj interparolis ĉi tie"*, ŝi skribis en sia taglibro dum la Dua Mondmilito.



Arkivo BV

La familio de Anne, kaj same multaj aliaj familioj, devis fuĝi el Frankfurto kiam pliintensiĝis la kontraŭjuda persekutado en la nazia Germanio. Ili alvenis al Amsterdamo (Nederlando) en 1933. Inteligenta, la knabino tuj vekis atenton pro sia scivolemo kaj lerneja aktivemo.


Kiam Anne Frank atingis la aĝon de 13 jaroj, ŝi gajnis kajeron binditan per ruĝa-verda kvadrita teksaĵo. Ĝuste en tiu semajno ŝi komencis registri surkajere la nazian okupacion de Nederlando. Tiam ŝia familio devis sin kaŝi en la fundoj de magazeno, kie laboris la patro de la knabino. Anne daŭre pasigis la tempon sindediĉante al la notskriboj  kaj al la plenumado de lernejaj taskoj. Post kiam la "Sekreta Aneksaĵo" estis malkaŝata, en aŭgusto 1944, la familia grupo estis sendata al la koncentrejo de Auschwitz, en Pollando. Post ioma tempo Anne kaj ŝia fratino, **Margot**, tri jarojn pli maljuna, estis apartigitaj de la gepatroj, **Otto** kaj **Edith**, kaj translokitaj al Bergen-Belsen, proksime de Hanovro (Germanio), kie ili mortis pro inanicio kaj tifo. Ŝia patro, la sola el la familio postvivanta la Judan Gentmurdon, helpe de sia iama sekretariino, **Miep Gies** (1909-2010), kiu fariĝis protektantino de la familio Frank dum ties 25-monata travivo en kaŝejo, sin donis al la diskonigo de la historio rakontita de sia filino. La verko estis lanĉita en 1947 kaj tradukita en dekojn da idiomoj.

Anne mortis antaŭ ol atingi la aĝon de 16 jaroj, sed ŝia priskribo ĝis hodiaŭ estas rigardata de multaj homoj kiel unu el la plej ŝokaj verkoj de la 20-a jarcento. *"Ĉiu homo portas ene de si eron da bonaj novaĵoj. La bona novaĵo resumiĝas al tio, ke vi ne scias kiom eksterordinara vi povas esti! Kiom multe vi povas ami! Kion vi povas plenumi! Kaj kiu estas via povkapablo! (...) Mirinda estas tio, ke oni ne bezonas atendi eĉ unu momenton por plibonigi la mondon"*, rimarkigis la juna, juda verkistino.

# Asha-Rose Migiro

## La eminenta ĝenerala vic-sekretariino de UN

Felipe Duarte




Adriana Rocha

La ĝenerala vic-sekretariino de UN, **Asha-Rose Migiro** (sur la foto el 2007, kun **Amanda Vieira**, Soldatetino de Dio, kiel karese estas nomataj la infanoj de Legio de Bona Volo), agis pionire ĉe la defendo de la noblaj projektoj en sia patrolando. En 1997, ŝi aliĝis al la komisiono starigita por la reformo de la konstitucio de Tanzanio.

La doktorino pri jurscienco ĉe la Universitato de Konstanz, Germanio, estis la unua virino okupi la postenon de ministro pri Eksteraj Rilatoj kaj Internacia Kunlaboro, en 2006, ekde kiam la afrika lando sendependiĝis, en 1961. Antaŭe, dum kvin jaroj, ŝi estis ministrino por la Elvolviĝo de la Komunumo, Geularo kaj Infanoj.

Ŝi jam laboris kune kun la nuna ĝenerala sekretario de UN, **Ban Ki-moon**, kiam ambaŭ plenumis la postenon de ministro pri Eksteraj Rilatoj en siaj respektivaj Ŝtatoj. Laŭ lia opinio, d-ino Migiro estas *“alte taksata gvidantino, kiu delonge defendas la interesojn de la disvolviĝantaj landoj”*. Iom antaŭ ol enposteniĝi ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ŝi prezidis la Konsilion de Ministroj de la Internacia Konferenco de la Grandaj Lagoj, el kiu rezultis la tiuregiona Pakto pri Sekureco, Stabileco kaj Elvolviĝo.

Okaze de la 51-a Kunveno pri la Situacio de Virino, d-ino Migiro substrekis al revuo *BONA VOLO*: *“Amo kaj komprenemo estas tre gravaj por ebligi ke la infanoj vivu pli feliĉaj kaj povu koncentriĝi sur aferojn, kiuj vere reprezentos progreson por ili. Kiam infano ricevas amon, ĝi estas stimulata, lernas ami kaj tiel kreas kondiĉojn al paca etoso por ĉiuj”*. Ŝi ankaŭ rekonis la strebon de Legio de Bona Volo en la batalo kontraŭ perfortemo kaj diskriminacio: *“La organizoj de la civila socio estas fundamentaj kunhelpantoj por starigi egalecon inter la seksoj. Tial, mi gratulas LBV-on pro la rekta agado favore al defendo de virinoj”*. ■

“La organizoj de la civila socio estas fundamentaj kunhelpantoj por starigi egalecon inter seksoj. Tial, mi gratulas LBV-on pro la rekta agado favore al defendo de virinoj”.




# Bibi Ferreira
# Honordamo de teatro

Carolina Dutra

Aktorino, kantistino, reĝisorino kaj komponistino, Abigail Izquierdo Ferreira, konata sub la nomo **Bibi Ferreira**, naskiĝis en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, en 1922. Filino de la brazila aktoro **Procópio Ferreira** kaj de la hispana baletistino **Aída Izquierdo**, Bibi ne povus sekvi alian vojon ol tiun de la artoj, kaj ekde frua aĝo ŝi montris talenton. Per letero al amiko, la patro tiam antaŭsentis la destinon de la knabino: *"Mi ne volas plu morti! Naskiĝis la printempo de mia vivo. Mi ricevis filinon nomatan Abigail, kiun mi nomos Bibi. Ŝi kantos, teatroludos kaj estigos multajn belaĵojn sur scenejo"*.

Ĉe la eksgeedziĝo de la gepatroj, Bibi iris loĝi ĉe la patrino. Akompanate de ŝi la eta dancistino debutis en la aĝo de tri jaroj en la urbo Santiago, en Ĉilio. Kiam ŝi revenis al Brazilo, ŝi eniris la Balistaron de la Urba Teatro de Rio-de-Ĵanejro. Ne pro tio la okazaĵoj estus al ŝi pli facilaj. Kiam ŝi estis naŭjara, oni neis al ŝi matrikuliĝon en kolegio pro la fakto, ke ŝi estas filino de aktoro, tiutempe komuna antaŭjuĝo kontraŭ tiuj apartenantaj al la artisma medio.

> "Mi vivas por la arto kaj estas ĝi kiu subtenas la forton de mia animo."
> **Bibi Ferreira**

Bibi elkreskis kaj komencis prepari al si la vojon. Ŝi fondis teatran kompanion en 1944, en kiu laboris famaj artistoj. Ŝia profesia kariero akiris, tamen, pli grandan antaŭenpuŝon nur de post 1946, kiam venis al ŝi la oportuna okazo anstataŭi pupon malaperintan iom antaŭ la komenciĝo de la teatraĵo *Sunaj matenoj*. Por ŝi sursceneja ludado estas io unika. *"Estas momento por kreipoveco. Por sankta kunligo de sentoj. Tre bela estas tia kunligo de teatra scenejo kaj spektantaro. Estas la momento dum kiu mi, pere de vi, renkontiĝas kun Dio"*.

La kontribuo de Bibi por la dramaturgio tuŝas homojn dum generacioj. Jen miregiga ekzemplo de ŝia sukceso: en 1983 ŝi ludis ĉefrolon en *Piaf, la Vivo de Stelulino de la Kanto*. La spektaklo vaste eĥis, kun bonega akcepto de la spektantaro kaj de la kritikistoj. La bela prezentado de la aktorino gajnigis al ŝi plurajn premiojn, kaj la teatraĵo estis prezentata dum ses jaroj.

Post *Piaf*, la aktorino iris sin prezenti en Portugalio, kie ŝi gvidis teatraĵojn dum kvar jaroj. En Brazilo, dum la jardeko 1990, ŝi reĝisoris la aplaŭditan *Lia Moŝto, la Kandidato*. Inter la famaj artistoj kiuj staris sub ŝia artgvidado alkalkuliĝas **Maria Bethânia**, **Clara Nunes**, **Marília Pêra**, **Marco Nanini**, **Paulo Gracindo**, **Baden Powell**, **Elizeth Cardoso** kaj **Ítalo Rossi**.

Eĉ surbaze de tiom da realigoj, kiuj igis ŝin ikono de la brazila kulturo, la rimarkinda artistino meritplene povus elekti ripozon: *"Sed mi amegas defiojn. Mi neniel kontentiĝas farante ion, kion mi facile superos"*.

La inklino al la sociaj agoj estas alia karakteriza trajto de tiu artistino. Iufoje ŝi esprimis sian apogon al Legio de Bona Volo: *"Tio kion LBV faras estas tiel grava, tiel serioza, ia dediĉa ago el humaneco kaj tiel granda beleco ke, kiam mi parolas pri LBV, mi restas tre emociita. Ĝi altiras respekton. Kaj oni admiras nur tion, kion oni respektas. Mi havas grandan admiron kaj konvinkon pri tio, ke LBV ankoraŭ plimulte kreskos, ĉar ĝi estas konstanta ago de bonkoreco"*.

memore

# Cecília Meireles

## Kapablo aliigi la vivon en poezion

Sarah Jane



Arkivo BV

Sinonimo al kulturo kaj referenco pri literatura arto, **Cecília Benevides de Carvalho Meireles** (1901-1964) dediĉis sian vivon al Edukado. La sola postvivanta el la kvar gefiloj de **Carlos Alberto de Carvalho Meireles** kaj **Matilde Benevides**, ŝi naskiĝis la 7an de novembro 1901, en la urbo Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Ŝia patro mortis kelkajn monatojn antaŭ ŝia naskiĝo, kaj same la patrino antaŭ ol la knabino fariĝis trijara. Ŝi estis edukata de la patrina avino, **Jacinta**.

La multaj ĝenoj tamen ne deprimis ŝin, male: *"(...) Tiuj kaj aliaj mortoj okazintaj en mia familio kuntrenis multe da kontraŭaĵoj, sed samtempe donis al mi, ekde infanaĝo, tian intimecon kun la morto, ke mi milde lernis tiajn rilatojn inter io efemera kaj io eterna. (...) La nocio aŭ la sento pri la pasemo de ĉio estas la fundamento de mia personeco".*


La amo al lernado estis io konstanta en ŝia vivo. Des pli, ke en la Lernejo Estácio de Sá, en Rio-de-Ĵanejro, ŝi ricevis el la manoj de **Olavo Bilac** — inspektoro de lernejoj kiu fariĝis granda, brazila poeto kaj aŭtoro de la Himno al la Nacia Flago — oran meritmedalon pro sia distingiĝa kaj laŭdata kurslernado. Frue ŝi ekkonis poezion: kiam estis 9 jaraĝa, ŝi verkis sian unuan poemon kaj, aĝante 16 jarojn, ŝi lanĉis *Espectros* (Spektroj), sian unuan libron. Pli estonte, la verko de Cecília inspiris la filmon *Os Inconfidentes* (La Nekonfidenculoj), en la jaro 1972, parte bazita sur ŝia verko *O Romanceiro da Inconfidência* (La Romanaro de la Nekonfidenc-Movado*), publikigita en la jaro 1953, post dek jaroj da esploro. Ŝi plue laboradis ĉe lernigado kaj specialiĝis pri Literaturo, Edukado kaj Folkloro. Ŝi instruis ĉe brazilaj kaj usonaj universitatoj kaj fariĝis internacia prelegantino.

Tiomgranda aktivado, malgraŭ ĉio, ne malpermesis al ŝi suriri alian gravan kampon de sia ekzistado: la patrineco. Ŝiaj tri filinoj naskiĝis dum ŝia unua edzineco: **Maria Elvira**, **Maria Mathilde** kaj **Maria Fernanda**; ĉi tiu lasta estiĝis fama teatrartistino. El la kunvivado kun infanoj, infaneco iĝis unu el la preferataj temoj de la verkistino. Krom libroj destinitaj al infanularo, Cecília starigis la unuan porinfanan bibliotekon en Brazilo kaj daŭre laboris por la altkvalita Edukado.

Ŝiaj poezioj estis tradukitaj al pluraj lingvoj, kiaj la hispana, franca, itala, angla, germana, hungara, hinda kaj urdua; krome ili estas muzikitaj de famaj komponistoj, nome **Camargo Guarnieri**, **Francisco Mignone**, **Lamartine Babo**, **Norman Frazer**, **Fagner,** inter aliaj. Nuntempe, la nomo Cecília Meireles estas aldonita al stratoj, lernejoj, kulturaj ĉambroj kaj, pro ŝiaj mirindaj kontribuoj, ĝi allasas valoran registron en la brazila Historio.

*Kolonia movado por brazila sendependeco de Portugalio.

# Eleanor Roosevelt





Eleanor Roosevelt gvidis aktivulojn por la civilaj kaj politikaj rajtoj en la tuta mondo. Kune, ili povis ŝanĝi la revon de universala deklaracio en realaĵon. Sur la foto el 1949, la unua damo de Usono montras la hispanlingvan afiŝon. Ŝi estis fotita ankaŭ kun la angla kaj franclingva versioj de la afiŝo.

UN Photo

# Porparolanto de homamasoj

Alexandre Rueda

Naskiĝinta en la urbo Novjorko kaj idino de elmigrintoj el Nederlando, **Anna Eleanor Roosevelt** (1884-1962) estis humanistino, diplomatino, elstara aktivulino pri Sociaj kaj Homaj Rajtoj, defendantino de garantioj kaj de rekono de junularaj rajtoj, de afrikdevenaj amerikanoj, de virinoj, de malriĉuloj, de minoritatoj. Ŝi ankaŭ estis ambasadorino de Unuiĝintaj Nacioj (UN) inter la jaroj 1945 kaj 1952, reprezentanta sian landon, nomumita de prezidento **Harry Truman** (1884-1972), kiu postsekvis ŝian edzon, **Franklin Delano Roosevelt** (1882-1945), ĉe la prezidenteco de Usono.



Franklin Roosevelt

Ŝia infaneco estis trafita de malfeliĉo kaj malfacilaĵoj, kio hardis ŝian senmankan karakteron. Post la antaŭtempa morto de la patrino, kiam ŝi estis okjara, ŝi ekloĝis ĉe la patrina avino. Du jarojn poste ŝi perdis la patron. Kiam ŝi aĝis 15 jarojn, oni sendis ŝin al Anglujo por studi ĉe Allenswood, ĉirkaŭurba lernejo en Londono. Tio estis marko en la vivo de la knabino Eleanor. En la lernejo, la direktorino — erudicia kaj energia virino, kutiminta viziti la politikajn, artismajn kaj literaturajn rondojn — havis grandan intereson por la timida kaj soleca, orfa bubino. La reveno de Eleanor al la altranga socio de Novjorko okazis kiam ŝi estis 18-jara. En 1905, ŝi edziniĝis kun Roosevelt, kuzo el malproksima parenceco, kun kiu ŝi havis ses infanojn.

Ilia geedziĝo suferis fortan baton en 1921 kiam Franklin, ĝuante ferion en Kanado, estis trafata de poliomjelito, kiu kaŭzis al li gravan malutilon al la movkapablo, precipe de la kruroj, forigante lin el la politika vivo. Lia patrino rekomendis al li emeritiĝon. Sed, kalkulante je la neskuebla kuraĝigo de sia dediĉema edzino, lia ĉefhelpa brako, li reprenis la politikan agadon pli intense ol antaŭe. Dum la paso de la okazintaĵoj, pro neceso, Eleanor estis devigata superi sian timidecon kaj tiucele ŝi estis trejnata ludi la rolon de prelegantino.

> Kun distingebla personeco kaj determino, malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, sen ektimo ŝi trairis sian vojon tiamaniere, ke ŝi fariĝis porparolanto de miloj da homoj kiuj apogis la lukton por la Homaj Rajtoj.

En 1939, pro diskriminacio, la nigra kantistino **Marian Anderson** (1897-1993) estis malpermesata prezenti sin en koncerto por elektita grupo da virinoj el la usona aristokrataro, ĉe Constitution Hall, en Vaŝingtono (D.C.). Tia insultego vekis reagon en la tuta mondo. La unua damo intervenis kaj sukcesis, ke oni transloku la prezentadon al Lincoln Memorial, sub la libera ĉielo kaj direktata al grandega ĉeestantaro. En la Paska Dimanĉo, la 9-an de aprilo, starante sur la ŝtuparo de la la historia monu-

Arkivo BV



Marian Anderson, ĉe Lincoln Memorial, en la ĉefurbo de Usono, Vaŝingtono.



Thomas D. Mcavoy

"Ĉiu, kiu havis la okazon vidi Eleanor Roosevelt sidiĝi antaŭ la edzo kaj kun firmaj okuloj al li diri: *'Franklin, mi trovas, ke vi devas...'* aŭ: *'Franklin, certe vi ne faros...'*, tiu neniam forgesos tiun sperton... Estus neeble diri kiel ofte aŭ kiamaniere usonaj registaraj procesoj ekhavis novajn destinojn pro ŝia determino".

**Rexford Tugwell**

Unu el la konfidaj konsilantoj de prezidento Roosevelt

mento antaŭ pli ol 75 mil personoj el ĉiaj popoloj — ne inkluzivante la nacian aŭskultantaron de radioelsendo, kiu nombris je milionoj da aŭskultantoj — ekestis la unuaj vortoj de Marian pere de la muziko: *"Mian landon mi prikantas"* (*"My Country 'Tis of Thee"*). Eksplodo de aplaŭdoj elrompis el la homamaso kaj tiutage ŝia voĉo ne estis silentigita pro antaŭjuĝo.

Sendepende de iu ajn etnio, s-ino Roosevelt akceptis ĉiujn en la Blanka Domo. Sed ŝi sciis, ke ŝiaj agoj povus inciti la kontraŭecon de politikaj apogantoj de ŝia edzo kaj, eĉ tiel, ŝi preferis flanke lasi la politikon kaj sekvi sian konsciencon, kio estis ĉeftrajto de ŝia vivo.

Unu el la konfidaj konsilantoj de prezidento Roosevelt, **Rexford Tugwell** (1891-1979), priskribis la klopodojn de la edzino por influi la edzon rilate la politikan celon de *New Deal*: *"Ĉiu, kiu havis la okazon vidi Eleanor Roosevelt sidiĝi antaŭ la edzo kaj kun firmaj okuloj al li diri:* 'Franklin, mi trovas, ke vi devas...' *aŭ:* 'Franklin, certe vi ne faros...', *tiu neniam forgesos tiun sperton... Estus neeble diri kiel ofte aŭ kiamaniere usonaj registaraj procesoj ekhavis novajn destinojn pro ŝia determino"**.

## La morto de la edzo kaj novaj destinoj

Ŝia agado ankaŭ estis tre grava dum la Dua Mondmilito. Eleanor estis pionirino por la sendependa kaj senembarasa defendo de politikaj kaj sociaj aferoj, ne restante en la ombro de sia edzo aŭ de postlasitaĵoj de la onklo **Theodore Roosevelt** (1858-1919). Post la morto de la edzo, ŝi havis okazon esti delegitino de Usono ĉe UN, daŭrigante sian aktivecon sur la internacia, politika scenejo, defende de la sociaj interesoj, ĉefe de tiuj rilataj al la virinoj. Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ŝi prezidis la komisionon kiu aprobis la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj, kio motivigis la tiaman usonan prezidenton Harry Truman nomi ŝin la unua damo de la mondo.

Ĉio ĉi montris la grandan kapablon de Eleanor daŭrigi sian politikan laboron kiel socia aktivulino, eĉ transpasante la limojn de la taskoj difinitaj al la unua damo. Cetere, kiam ŝi eliris el la Blanka Domo, en 1945, la limvojoj por ŝia postsekvantino jam estis rektigitaj. Kun distingebla personeco kaj determino, malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, sen ektimo ŝi trairis sian vojon tiamaniere, ke ŝi fariĝis porparolanto de miloj da homoj kiuj apogis la lukton por la Homaj Rajtoj. ■

* Rexford Tugwell, "Remarks", *Roosevelt Day Dinner Journal*, Americans for Democratic Action, la 31-an de januaro 1963.

# Gabriela Mistral

# Unua latin-amerika virino Nobel-premiita pri Literaturo

Ĉarmaj skribverkoj kun poeta Animo. Jen la karakteriza trajto per kiu **Gabriela Mistral** estas levita al alta plataĵo kiel unu el la plej famaj poetinoj el ĉiuj tempoj. Lucila Godoy y Alcayaga — baptonomo de tiu edukistino, verkistino, diplomatino kaj feministino — naskiĝis en la 7-a de aprilo 1889, en la urbo Vicuña (Ĉilio). La pseŭdonimon Gabriela ŝi prenis omaĝe al la itala poeto **Gabriele D'Annunzio**, kaj Mistral devenas de **Frederic Mistral**, provenca poeto, kiun ŝi tre admiris.

Gabriela ricevis diplomon de instruistino en sia 18-a jaraĝo kaj dum longa periodo instruis ĉe la baza kaj fundamenta eduknivelo. En tiu tempo, ŝi transloĝiĝis al la vilaĝo La Cantera, kie ŝi enamiĝis al modesta servisto de fervojo, al kiu ŝi adresis siajn unuajn versojn. Pli malfrue la junulo memmortigis sin. Kun la koro vundita en la plej profundo, ŝi lernis ŝanĝi tragedion de la vivo – kiuj cetere ne estis malmultaj, kiel ekzemple la forlaso de la patro kiam ŝi aĝis tri jarojn — en poemojn, prikantante al siaj legantoj versojn pri sublimigita amo.

En 1945, ŝi ricevis Nobel-premion pri Literaturo. Tio estis la unua fojo ke oni destinis tiun honoraĵon al iu el Latin-Ameriko — nuntempe, la regiono estas reprezentata de kvin premiitoj en tiu kategorio. Sed tamen, Mistral estas ĝis nun la sola sudamerika virino ricevinta tiujn laŭrojn. Ŝia poezio estis tradukata en plurajn idiomojn kaj influis la laboron de multaj latin-amerikaj verkistoj, eĉ de **Pablo Neruda**, ankaŭ el Ĉilio, kaj de la meksikano **Octavio Paz**, ricevintaj, ambaŭ, la Nobel-premion pri Literaturo respektive en 1971 kaj 1990.

▸▸


Arkivo BV

## Ŝia poezio estis tradukata en plurajn idiomojn kaj influis la laboron de multaj latin-amerikaj verkistoj

Dum dudek jaroj, ekde 1933, ŝi laboris kiel konsulino de sia lando, en Lisbono, Madrido, Napolo, Los-Anĝeleso, interalie. Ŝi ankaŭ estis en Brazilo dum la jaroj 1940-aj, ĉiam portante en sia koro teneran kareson ĉu al la lando ĉu al la brazila popolo.

La jaro 1923 estis reliefa en la vivo de Gabriela kiel edukistino: post plenumo de grava rolo en la ĉilia eduksistemo kaj post la publikigo de sia unua libro de poezioj, *Desolación* [Konsterno], ŝi ricevis inviton de la registaro el Meksikio por prilabori la tiulandan reformon je edukado. Ĉe la tutmonda elmontro de ŝia verkaro kaj internacia rekono, la diplomatino estis invitata labori en la iama Ligo de Nacioj, en Ĝenevo, Svislando, kaj en diversaj institucioj por supera instruo en Eŭropo kaj Latinameriko. Krome, ŝi estis honormembro de pluraj kultur-societoj en Ĉilio, Usono, Hispanio kaj Kubo. Ŝi ankaŭ lekciis pri Hispana Literaturo ĉe Columbia University, ĉe Middlebury College kaj Vassar College, en Usono, kaj ĉe Universidad de Puerto Rico, en Porto-Riko.

Krom premioj, la ĉilia pensulino estis multfoje omaĝata pro sia literatura kaj intelekta postlasaĵo. Oni havas respektegon al ŝia memoro ĝis hodiaŭ. Ekzemplo de tio estas la aludo al ŝi farita de la verkisto Paiva Netto en artikolo publikigita en centoj da ĵurnaloj, retpaĝaroj kaj revuoj, en Brazilo kaj eksterlande, kaj disvastigata per miloj da disendoj el radio kaj TV-stacioj. En la teksto titolita "Gabriela Mistral, Renan kaj Eça de Queiroz", la ĵurnalisto reproduktas parton de unu el la plej rimarkindaj poemoj de Mistral, en kiu ŝi donas specialan sencon al servado, publikigita en la revuo BOA VONTADE [BONA VOLO], en 1957. *"La tuta naturo estas sopiro pri servado. (...) Servado ne estas io propra al malsuperaj estuloj. Dio, kiu al ni donas frukton kaj lumon, servas. Li do povus esti nomata: La Servanto".*

Gabriela Mistral mortis en la 10-a de januaro 1957, en Novjorko (Usono), kaj estas entombigita en Montegrande, en Ĉilio, laŭ sia deziro. Ŝia spirito de humaneco restas vivanta, plenigante per vivanteco ŝian tutan verkaron. **[A.R.]** ■




La revuo BOA VONTADE n-ro 9, de marto 1957, faras omaĝon al la karmemora Mistral, prezentanta detalojn pri ŝia biografio kaj reeldonante la malsupran poemon.

## La plezuro el servado

*Gabriela Mistral*

La tuta naturo estas sopiro pri servado.

Servas la nubo, servas la vento, servas la maro.

Kie estos plantenda arbo, plantu ĝin vi mem; kie estos korektenda eraro, korektu ĝin vi mem; kie estos tasko, kiun ĉiuj rifuzas, akceptu ĝin vi mem.

Estu vi tiu, kiu forprenas la ŝtonon de sur la vojo, la malamon el la koroj kaj la malfacilojn el la problemoj.

Estas ĝojo en sincereco kaj justeco; estas tamen, multe pli ol tio, la bela, grandega ĝojo servi.

Kiel malĝoja estus la mondo se ĉio jam estus farita, se ne estus iu rozujo por planti, iu iniciato por entrepreni!

Ne vin allogu la facilaj laboroj. Estas bele plenumi tion kion aliuloj rifuzas fari.

Ne falu, tamen, en la eraron pensi, ke nur estas merita la ellaborado de la grandaj verkoj; estas malgrandaj servtaskoj, kiuj bone utilas: ornami tablon; ordigi librojn, kombi la harojn al infano.

Unu mallaŭdas, alia detruas: estu vi tiu, kiu servas.

Servado ne estas io propra al malsuperaj estuloj. Dio, kiu al ni donas frukton kaj lumon, servas. Li do povus esti nomata: La Servanto.

Li fikse rigardas niajn manojn; kaj demandas ĉiutage: Ĉu vi servis hodiaŭ? Al kiu?

Al la arbo, al via Amiko, al via Patrino?

# Templo de Bona Volo

## estas aklamita de la popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF—Brazilo





Kun la apogo de Virinoj, la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, fondis la Templon de Bona Volo (TBV). Aklamita de la popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF, Brazilo, ekde kiam ĝi estis inaŭgurata, en 21/10/1989, ĝi jam ricevis pli ol 19 milionojn da pilgrimantoj. Laŭ oficialaj datumoj de Sekretariejo pri Ekonomia Disvolviĝo kaj Turismo de Federacia Distrikto (SDET), ĝi estas la plejmulte vizitita monumento el la ĉefurbo de Brazilo. Apud Parlamundi kaj ĝia administra sidejo, la Templo de Paco konsistigas la Ekumenan, Arkitekturan Ensemblon de Legio de Bona Volo.

**Vizitu ĝin! SGAS 915 – Lotes 75/76 – Braziljo/DF – Brazilo**

**Informoj: (+5561) 3245-1070 • www.tbv.com.br/esperanto**

# Irena Sendler

## Kuraĝo kaj Frateco

Aline Portel

Multaj ankoraŭ ne konas la heroecan historion de **Irena Sendler**, ekzemplo pri kuraĝo de virina animo firme laboranta favore al Paco. Naskiĝinta en 1910, en Pollando, la katolika flegistino plenumadis sociajn servojn, jam antaŭ la Dua Monda Milito (1939-1945), ĉe malriĉaj familioj. En 1942, dum la Juda Gentmurdo, ĉe la starigo de Varsovia Geto, ŝi elmetis sian vivon al risko kiam ŝi aliĝis al la Konsilio por Helpo al la Judoj, provizante la izolitojn per nutraĵoj, vestoj kaj kuracistaj zorgoj.

Enŝoviĝante en departementon de la sanitara kabineto, respondeca pri la kontrolo de kontaĝaj malsanoj, Irena kaj la aliaj de ŝi kunigitaj kunlaborantoj kontaktis la familiojn kaj proponis konduki iliajn infanojn ekster la geton, al sekuraj lokoj. Tiamaniere ŝi sukcesis elirigi el tie, sen permeso, pli ol 2.500 infanojn. Ŝi ilin kolektis en ambulancojn, kvazaŭ ili estus viktimoj de tifo, envolvitaj en sakoj de nutraĵoj, rubujoj, ilarkestoj kaj eĉ en jakoj, tial ke oni ne veku suspekton.

Irena arkivis la personajn informojn de ĉiu liberigito: veran nomon, la familian devenon, la familion kaj lokon al ili destinitajn. Ŝi enterigis tiujn informojn en vitrajn ujojn en la ĝardeno de domo apartenanta al amikino.

En 1943, Irena estis arestata kaj torturata, sed ŝi ne malkaŝis la identigilon kaj loĝlokon de la infanoj. En prizono ŝi trovis malgrandan bildon de Jesuo kun la surskribo: *"Jesuo, Vin mi konfidas"*, kio renovigis ŝiajn fortojn. Tiam ŝi estis kondamnata al morto, sed, survoje al la ekzekutado, iu soldato lasis ŝin forkuri, subaĉetite de la rezist-movado Zegota. Ŝi daŭrigis siajn humanajn agojn ĝis la militfino. Ŝi mortis en majo 2008, havante la aĝon de 98 jaroj.

La unua rekono pri ŝiaj heroecaj agoj okazis en Pollando, en 1965, kiam ŝi ricevis la titolon *Justa inter la Nacioj*, el la Izraela Memorigejo pri Juda Gentmurdo. En 2007, oni indikis ŝin al Nobel-premio pri Paco. *"La motivo kial mi liberigis la infanojn havas originon en mia hejmo, en mia infaneco. Mi estis edukita laŭ la kredo, ke necesbezona persono devas esti helpata per la koro, sen atento al ilia religio aŭ nacieco"*, substrekis Irena, kiu surprizis pro sia senlaca konscio pri la humana devo laŭ ĉiaj klopodoj estas ankoraŭ ne sufiĉaj.


Informado

> "Ĉiu infano savita pere de mia helpo estas pravigo por mia ekzistado sur la Tero."
> **Irena Sendler**




# Maria Barroso

## En defendo de la Homaj Rajtoj

Leonardo Mattiuzzo

**Maria de Jesus Simões Barroso Soares** — naskiĝinta la 2-an de majo 1925, en Fuzeta (Portugalio) — licenciatiĝis pri Historiaj, Filozofiaj Sciencoj ĉe Beletra Fakultato de Lisbono, kie ŝi konatiĝis kun **Mário Soares**, kun kiu ŝi edziniĝis en 1949 kaj naskis du infanojn: **Isabel** kaj **João Barroso Soares**. Fininte la fakultatajn studojn, en la jardeko 1950, ŝi eksekvis kurson pri Drama Arto ĉe Nacia, Portugala Konservatorio, ludante dum kvar jaroj en la Nacia Teatro. Tamen, pro siaj politikaj konvinkiĝoj kiel membro de Demokratia Opozicio al la reĝimo de **Salazar**, ŝi estis malpermesata labori kaj, tuj poste, maldungata.




La portugala ŝtatisto Mário Soares kaj Edson Arantes do Nascimento, **Pelé**, ricevas el la manoj de la ĵurnalisto Paiva Netto la Meritan Ordenon de la Ekumena Frateco de ParlaMundi de LBV, en Braziljo (1997).

Krome, malgraŭ ŝia lerteco kaj kompetento por la magistra laboro, ŝi estis malpermesata ekzerci ankaŭ la profesion de instruistino, eĉ en privataj lernejoj, dum tiu reĝimo.

Forpasinte kelkajn jarojn, en 1969 ŝi kandidatiĝis al parlamenta posteno pere de la sama partio, al kiu ŝi aliĝis en sia juneco. Ŝi estis elektata deputitino de la distriktoj Santarém, Porto kaj Algarve, ĉiam tenante efektivan agemon, super ĉio en la kultura vivo per diskonigado de la poezio el Portugalio kaj el eksterlando.

De 1986 ĝis 1996, kiam Mário Soares ekzercis la prezidentecon de la Portugala Respubliko, per du sinsekvaj mandatoj, ŝi plenumis agadon favoran al kulturo, edukado kaj familio, infanaro, socia solidareco, virina statuso, sano, integriĝo de handikapuloj kaj antaŭforigo de perforto.

Ŝi proponis en sia lando debaton kaj pripensadon pri perforto, impetege denuncante tiam ĉiajn situaciojn ĉe kiuj la Homaj Rajtoj estis neglektataj, defendante kaj helpante movadon favoran al la viktimoj de milito, malsato, rasismo, ksenofobio; al la virinoj kaj infanoj malbontraktitaj. Ŝi aparte maltrankviliĝis pri la situacio de la popolo el Timoro.

El la multnombraj institucioj kiujn ŝi fondis aŭ helpis fondi, elstariĝas Asocio por Studo kaj Antaŭforigo de Perforto (APEV, portugale), Porinfana Savo, Fondaĵo pri Digneco kaj Fondaĵo Aristides de Souza Mendes.

En la 28-a de julio 1997, ŝi akceptis prezidi la portugalan Ruĝan Krucon, kiun ŝi gvidis ĝis 2003.

Ŝiaj agoj estas daŭrigataj en la sama ritmo, nacie kaj internacie, kaj dank' al tia seninterrompa agado ŝi altiris simpation de la portugala kaj brazila civila socio kiel humana korifeo en esencaj agkampoj.

Pri la sociedukaj programoj subtenataj de LBV de Portugalio, ŝi iufoje prikomentis: *"Mi tre bone konas LBV-on! Cetere, kiam mi estis en Porto, dum vizito al la tiama prezidento [de Brazilo]* ***Sarney****, mi havis okazon pli bone scii pri Legio de Bona Volo".*

# *Patrino*

# La bonkora



Informado/Editora Roca

En la malgranda urbo Skopje, hodiaŭa ĉefurbo de la Respubliko Makedonio, bela montara lando de Balkanoj, la 27-an de aŭgusto 1910 naskiĝis tiu, kiu vekis admiron ne nur tra la mizeraj kvartaloj kaj tra la plej malgajaj stratoj de la jarmila Hindio, sed ankaŭ tra la tuta mondo, fariĝante unu el la plej grandaj heroinoj de la Homaro. Ŝia nomo: **Agnes Gonxha Bojaxhiu**, pli malfrue konata de la malriĉaj je la korpo kaj je la Animo kiel Patrino Tereza el Kalkuto, nomo elektita kiel simpla omaĝo al alia abnegacia ekzemplo de virino — **Tereza el Avila**, hispana religiulino el la 16-a jarcento.

Je la aĝo de 18 jaroj, ŝi decidis, ke ŝia vivo estos plene dediĉata al Dio. Kun permeso de siaj gepatroj, ŝi vojaĝis al Irlando kaj, laŭ indiko de la pastro ŝin orientantan, tuj eniris, la 29-an de septembro 1928, en la religian ordenon Monaĥinejo Patrino de la Fratinoj de Nia Sinjorino el Loreto, en Rathfarnham, proksima al Dublino.

La materia kaj spirita mizero de tiom da personoj tuŝis ŝian koron. Ŝi faris decidon, kaj

Virinoj Virinoj Virinoj Virinoj Virinoj

memore

# Tereza el Kalkuto

# anĝelo de la malsanuloj

Irani Maria

transloĝiĝis al la fora Hindio, por vivi en samnoma monaĥinejo, en Darjeelin. Tamen Patrino Tereza sentis grandegan deziron labori surstrate kie ŝi opiniis sin pli utila por la helpo al la senhavuloj. Ŝi kunordigis kunlaborantojn, kiuj havis samajn idealojn, streĉis siajn fortojn kaj ekbatalis. Ŝi fondis en Kalkuto helpcentron por homfratoj trafitaj de lepro, montrante, ke ŝi faros grandajn klopodojn favore al la malsanuloj. Tiu asista laboro komenciĝis post kiam la hinda registaro donacis terenon en la ĉirkaŭaĵoj de Asansol, kie estis starigata Shanti Nagar (Urbo de la Paco).

En 1948, ŝi kreis la Ordenon de la Misiistinoj de Karitato kaj fariĝis hinda civitanino. Dum ŝia 85-jaraĝo, ŝi havis sufiĉan energion por fondi en Novjorko la unuan centron por aidoso-viktimoj. Ŝi ankaŭ sindediĉe instruis al infanoj legi kaj skribi.

Patrino Tereza ricevis, en 1971, la Premion Johano la 23-a por la Paco. En 1979 oni donacis al ŝi Pac-Nobelpremion. La tuta monkvanton de tiuj premioj ŝi destinis al la starigo de novaj centroj por asistado. Do multobliĝis ŝiaj verkoj de Amo kaj abnegacio en pluraj landoj, en kiuj pli ol tri mil monaĥinoj laboradis kiel Misiistinoj de Karitato.

Dume, pligraviĝis la stato de ŝia fizika sano, sekve de ŝia malfacilega vivo de servado. Plurfoje ŝi apudestis la morton. Pliajn jarojn poste, en unu el tiuj okazoj, malgraŭ la deklaro de kuracistoj, ke ŝi estas nepre baldaŭ mortonta, ŝi revenis al la agado, post kiam ŝi havis la vizion de anĝelo informanta al ŝi, ke ankoraŭ ne venis fino al la laboro. Ŝi pluvivis du jarojn kaj mortis en 1997, en la malnova Hindio, kie ŝi batalis dum preskaŭ sia tuta vivo.

## Omaĝo

Okaze de la inaŭguro de la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, ParlaMundi de LBV, en Braziljo/DF, Brazilo, dum Jesua Kristnasko, en 1994, pere de bela letero Patrino Tereza manifestis sian apogon al la kreado de tiu Forumo, destinita valorigi la Homan kaj Spiritan Vivon: ***“Estimata s-ro José de Paiva Netto, mi transdonas al vi miajn preĝojn por ĉiuj. Benoj de Dio estu ĉe vi en Legio de Bona Volo, kaj multaj homoj ekkonu la Amon de Jesuo pere de la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco kaj de TBV, kaj konservu vivanta la Bonan Mesaĝon de Lia Amo en la mondo, amante unuj la aliajn, same kiel Li amis nin. Dio vin benu”.***

Per aldona komento pri ĉi tiu granda misiistino, José de Paiva Netto, ĉefgvidanto de Legio de Bona Volo, insistas laŭdegi ŝian humilecon kaj sindonon al tiuj plej senhavaj, per inkludo de figuro de ŝia serena vizaĝo sur la panelon *La Evoluo de la Homaro*, eksponita en Templo de Bona Volo, monumento apud ParlaMundi, por ke ŝi ĉiam restu viva en la koroj de la Bonvoluloj. ■

# Maria Luiza Viotti

# Energio kaj talento ĉe diplomacio

Per mirinda kariero sur la kampo de politiko por eksterlandaj aferoj — sur kiu ŝi laboras de pli ol tridek jaroj —, **Maria Luiza Ribeiro Viotti**, la ambasadorino de Brazilo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, de longe montradas la brazilajn konkerojn koncerne la komunajn interesojn kun UN, kaj same rilate la bonajn, praktikajn interŝanĝojn kun aliaj nacioj.

Naskiĝinta en Belo Horizonte/MG, la 27-an de marto 1954, ŝi komencis sian diplomatian karieron en 1976, kiam ŝi eklaboris en la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj por servi en la divizio de operacioj por komerca disvolvado. Tie ŝi povis kontribui por la ampleksigo de la komercaj rilatoj inter Brazilo kaj Ĉinio, kaj kun afrikaj landoj.

La unuan postenon ĉe Unuiĝintaj Nacioj ŝi okupis meze da la 1980-a jardeko, kiel unua sekretariino de la Brazila Misio ĉe tiu organizaĵo. Reveninte al sia naskolando, ŝi komencis ekzerci diversajn funkciojn en la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj. Ĉefe altirata de la volo defendi la brazilajn interesojn sur la internacia scenejo, Viotti denove estis komisiata por labori ĉe UN, en 1999.


UN Photo/Evan Schneider

Dum la konferencoj, en kiuj ŝi partoprenas, la ambasadorino ĉiam reliefigas la ekonomikajn, politikajn kaj sociajn kompromisojn de la brazila registaro por starigo de vivo pli digna al ĉiuj brazilanoj. Antaŭ nelonge, dum intervjuo de Radio UN, ŝi prikomentis la sukcesojn atingitajn de la laborprogramo de Celoj por Elvolviĝo de la Jarmilo (MDG, angle): *"Brazilo jam atingis la unuan celon, tiun de la reduktado de malsato kaj malriĉeco. Ĉi tiu konkero estas tre valorigita okaze de la ekzamenado de Brazilo farita de la Konsilio por la Homaj Rajtoj. Ni jam havis progresojn pri sanigado, strebado kontraŭ malsanoj kiaj HIV/aidoso, ftizo kaj malario, kaj sur la kampo de batalo kontraŭ virina perforto kaj forigo de rasismo"*.

De la komenco de sia kariero, s-ino Maria Luiza Viotti elstariĝas per agado sur la plej variaj kampoj por plifortigo de la brazila politiko por eksterlandaj aferoj. Ŝiaj streboj ankaŭ direktiĝas al la serĉo de strategioj por la Paco kaj por disvolviĝo de Gvineo-Bisaŭo, kaj same por diskonigo de la utiloj el la uzo de etilalkoholo kiel taŭga alternativo por la daŭropova, ekvilibra produktado de energio. Nuntempe unu el la ĉefaj prizorgoj de la diplomatino estas labori por ampleksigo de la nombro de konstantaj membroj de la Konsilio pri Sekureco de UN, tial ke ankaŭ Brazilo estu konstanta membro de tiu organo.

Pro tiaj kialoj, s-ino Viotti ludas gravan rolon en la pli kaj pli granda diskonigado de la naturaj riĉaĵoj, kulturo kaj bonefika agado de Brazilo. **[F.D.]**

*memore*

# Maria Quitéria

# Heroino de Sendependeco de Brazilo

Ekde frua junuleco la bahianino **Maria Quitéria de Jesus** (1792-1853), rigardata kiel la brazila **Johana de Arko**, elmontris inklinon servi armeon. Filino de **Gonçalo Alves de Almeida** kaj **Joana Maria de Jesus**, ŝia alvokiĝo estis konstraŭstarata de la patro kaj de la dua duonpatrino. Ekposedita de la idealo pri libereco kaj certa, ke ŝi traluktos la ĉefan batalon por Sendependeco de Brazilo (okazinta en la urbo Salvador), laŭ rigardata de historiistoj, ŝi fuĝis el la hejmo, prunteprenis de bofrato uniformon kaj la familian nomon (soldato Medeiros) kaj aliĝis al militfortoj por defendi Bahian [brazila subŝtato] kontraŭ la portugalaj trupoj.


Arkivo BV

La trompo ne longe daŭris. Post semajno ŝi estis malkovrata, sed tamen ŝi tenis sian kondiĉon en la trupo, dank'al sia kuraĝo, soldateca lerto kaj braveco dum kombato, kion atentgis la militistoj. Per tia teniĝo ŝi plue luktis ĝis kiam la konflikto estis venkata de la brazilanoj.

Post la venko, dum la liberiga armeo eniris la ĉefurbon de Bahia, la loĝantaro aklamis la heroinon de la Sendependeco. La omaĝado ripetiĝis en Rio-de-Ĵanejro, kie ŝi estis akceptata de la imperiestro **Petro la 1-a**, kiu ŝin honoris per la Imperia Ordeno de Sudkruco. Maria Quitéria profitis la okazon kaj ekvolis de la imperiestro leteron por peti pardonon al la patro.

Kelkajn monatojn post reveno al la bieno Serra da Agulha, ŝi edziniĝis kun la terkulturisto **Gabriel Pereira de Brito**, kun kiu ŝi havis filinon, **Luísa Maria da Conceição**. Ekde tiam, Maria Quitéria travivis tre malriĉan ekzistadon ĝis sia morto, en 1853.

Pli malfrue, per rekono de la faroj de la heroino de la Sendependeco, la nomo Maria Quitéria estis surskribita sur milita medalo kaj sur komendo de la Urba Konsilantaro de Salvador. Laŭ ministeria ordono, ŝia figuro enestas en ĉiuj kazernoj, komandejoj kaj militfakoj de Brazilo. Laŭ prezidenta dekreto datita je la 28-a de junio 1996 , ŝi estas indikita kiel Patrono de la Komplementa Kariero de Oficistoj de la Brazila Armeo. **[S.J.]**




Informado

# Maurren Maggi
# Ora Brazilanino

Aneliése de Oliveira

Brazilanino el la urbo San-Karlo, el ŝtato San-Paŭlo, **Maurren Maggi**, 33-jara, atingis la plej altan lokon sur podio destinita al plurvaria sporta konkurso, konkerante la respekton de siaj oponantinoj kaj la koron de la brazila partianaro. Ŝi estis la unua virino gajni ormedalon en individuaj sport-kategorioj por la brazila atletismo dum Olimpikoj. Per trajektorio markita de memsuperado, ŝi fariĝis konata en 1999, post kiam ŝi starigis la sudamerikan rekordon pri salto en distanco, atinginte 7,26 metrojn, en Kolombio, kaj ankaŭ post la konkero de ora medalo en la sama kategorio dum la Tutamerikaj Ludoj en Winnipeg (Kanado).

De tiam, la atletino trapasis malfacilan periodon de sia kariero. Ĉe la Olimpikoj en Sydney, en 2000, ŝi estis en la 25-a pozicio, pro lezo dum disputo. Tri jarojn poste, pro *dopping* (dopado) oni pune eksigis ŝin el la Tutamerikaj Ludoj en Santo Domingo kaj, en 2004, oni malpermesis al ŝi partopreni la Olimpikojn en Ateno. En tiu haltdeviga periodo, ŝi naskis la filinon **Sofia**. *"Mi ĉiam pensis pri la ideo ne reveni"*, ŝi tiam diris. Tamen, pro la kredo je la transformiga forto de sporto en sia vivo, Maurren decidis reveni en 2006.

Per kompetenteco kaj tekniko, ŝi multe laboris kaj montris al si mem kaj al la publiko, ke estas eble superi malfavorajn situaciojn kaj refari la vojon. Ŝi rekomencis sian karieron kaj konkeris la oran medalon dum Tutamerikaj Ludoj en Rio-de-Janejro, en 2007, atingante la saltdistancon je 6,84 m. La plej bona okazaĵo ankoraŭ estis venonta: la Olimpikoj en Pekino, en 2008. En la komenco de la disputo ŝi petis al la ĉeestanta publiko aplaŭde akompani per ritmaj manfrapoj kaj tuj per la unua salto, el serio da ses provoj, ŝi sukcesis la nekredeblan registron de 7,04 m, garantiante la oran medalon.

La konkero esti en la mondo la plej altranga je salto en distanco, post kiam ŝi esprimis intencon ne plu disputi, kronis la atletinon kaj lasis fortan registron en la memoro de la ĉeestantaro kaj de milionoj da brazilanoj, kiuj akompanis per TV ŝian emocion. Sur la plej alta loko de la podio, tenante la oran medalon, ŝi dediĉis sian venkon al la filino, Sofia.




Arkivo BV

Sed ne estas tiuj la nuraj konkeroj kiuj pliriĉigas la vivresumon de Maurren. Ŝia apogo al la sociaj idealoj ankaŭ igas ŝin ĉampionino. Ekzemple, en la jaro 2007 ŝi partoprenis la kampanjon *Konstanta Kristnasko de LBV — Jesuo, Nia Pano ĉiutaga!*, invitante la loĝantaron unuigi sin helpe de la malplej favorataj, homoj asistataj de la Institucio dum la jaro. *"Se ĉiu plenumus tion al si koncernan, ni multe pli bone vivus tiel en Brazilo kiel en la mondo. Mi plenumas mian parton"*, ŝi deklaris.

# Shirin Ebadi

## Unua islamanino honorigita per Nobel-premio pri Paco

Hamadan estas rigardata kiel la plej malnova, persa urbo. Ĝia riĉa kulturo klarigas kial ankoraŭ nuntempe ĝi estas unu el la plej gravaj provincoj de Irano, la iama Persio. En tiu jarmila urbo, kiu havas nun duonmilionon da loĝantoj, naskiĝis en 1947 granda irana personeco: la juristino **Shirin Ebadi**, distingiĝa persono, kiu multe klopodis por demokratio kaj por Homaj Rajtoj. La trajtoj de ŝia karaktero ekde frua aĝo konfirmis la influon de la patro: **Mohammad Ali Ebadi**, krom esti tre konata verkisto, ankaŭ elstaris kiel pionira prelegganto ĉe la pritrakto de komercaj rajtoj.

Informado



La familio, deveninta de islamanoj, frue transloĝiĝis al la ĉefurbo, Teherano. Shirin Ebadi diplomiĝis pri Juro en 1965 kaj, post tri jaroj kaj duono, eklaboris en la Departemento pri Justeco. En 1969, ŝi oficiale ekzercis la postenon de juĝistino, dum ŝi daŭrigis siajn studojn por doktoriĝo, kio okazis unu jaron poste.

Unua virino okupi la postenon de juĝistino en Irano, ŝi prezidis en 1975 la landan leĝodonan kortumon. Sed ŝi devis forlasi la postenon pro la Irana Revolucio de 1979. *"Oni devigis min labori kiel juĝregistristino en la sama kortumo kiun mi iam prezidis. Ni ĉiuj protestis. Rezulte de tio, oni promociis ĉiujn eks-juĝistinojn al la posteno de 'ekspertoj'. Mi ne sukcesis plu toleri la situacion kaj ili akceptis mian peton pri anticipa emeritiĝo."*

Post jaroj da izoliteco en sia hejmo, en 1992 ŝi fine ricevis licencon por denove advokati. Tamen oni ŝin daŭre persekutis: oni perforte malfermis ŝian oficejon kaj ĉiuj ŝiaj arkivoj, dokumentoj kaj komputiloj estis konfiskataj. Ebadi alprenis la devon defendi subpremitojn kaj, de tiam, ŝia agado elvolviĝas antaŭ ĉies okuloj. Ŝi sin donis al la defendo de malfacilaj aferoj, kiuj diskoniĝis trans la landlimoj de Irano. Familioj de murditoj, kazoj pri seksperforto kontraŭ infanoj kaj rifuĝintoj de la reĝimo ricevis ŝian laŭleĝan reprezenton.

Dum sia foriĝo, ŝi skribis multajn librojn. Ŝi ankaŭ ricevis diversajn premiojn, inter ili la Nobel-premion pri Paco en 2003, unuafoje donitan al islamanino, precipe pro ŝia lukto por egaleco de rajtoj por virinoj kaj infanoj, kaj por politikaj reformoj en Irano.

La juristino, kiu rakontis pri sia infana vivo ĉe *"familio plena de boneco kaj amo"*, identiĝas kun la proponoj de Legio de Bona Volo por konstruo de pli bona mondo surbaze de fratama kunvivado kaj de respekto al malsimileco. Dum evento realigita de UN, ekkonante la revuon *Solidara Socio*, ŝi asertis: ***"Mi esprimas miajn bondezirojn, ke LBV kontribuu por ke la brazila popolo vivu Pace, libera de timo kaj timigo, kiujn trudas la trairado de perforto".*** **[N.L.]**

# Tomie Ohtake

# Honordamo de la plastikaj artoj


Jéssica Botelho

La arto de **Tomie Ohtake** transpasis duonan jarcenton da rekono kaj aplaŭdoj de kritikistoj kaj de publiko, kio rajtigas al ŝi la hodiaŭan titolon de damo de la brazilaj, plastikaj belartoj. Posedantino de unika stilo, karakterizata de la kapablo konstrui la verkon kaj la vivon, ŝi naskiĝis en 1913, en la urbo Kioto (Japanio). Kiam ŝi estis infano, ŝi havis kontakton kun la orienta skribo, nemalhavebla por klara esprimkapablo, bazita sur utiligo de literoj kaj ideogramoj. Al la knabino, de kaligrafio al desegnado estis natura paŝo.

En 1936, aĝante 23 jarojn, ŝi elmigris al Brazilo kaj ekloĝis en la urbo San-Paŭlo. De la adoleskanteco venis ŝia interesiĝo pri arto, sed la deziro fariĝi artistino konfirmiĝis dum vizito al eksponado de la japana, plastika artisto **Keisuke Sugano**, en 1952, kun kiu, cetere, ŝi havis kelkajn lecionojn.

En la komenco de sia kariero, Tomie portretis pejzaĝojn, ĉefe tiujn proksimajn al ŝia loĝloko. Iom poste ŝi anstataŭigis la figuran arton per la abstrakta, kiu estis reliefa trajto de ŝia stilo. Ŝia unua individua eksponado, en 1957, okazis en la Muzeo de la Moderna Arto de San-Paŭlo (MAM, portugale).

De la komenco de la jardeko 1960-a, kiam ŝi nacianiĝis kiel brazilanino, pliampleksiĝis ŝia partopreno en la ĉefaj naciaj kaj internaciaj artspacoj. Ŝi ĉeestis en kvin realigoj de la Internacia Bienalo de San-Paŭlo, faris ĉirkaŭ 50 individuajn kaj 85 kolektivajn eksponadojn, en Brazilo kaj en eksterlando. Ŝi ankaŭ ricevis plurajn kaj signifoplenajn premiojn dum kvar jardekoj da aktiveco.



Informado

En 2000, la elstareco de Tomie sur la brazila scenejo rekonfirmiĝis per la granddimensiaj artaĵoj en publikaj spacoj, kun grandegaj vitraloj kaj skulptaĵoj longas je ĝis 40 metroj.

Alia grava punkto de ŝia vojo estis la inaŭguro, en 2001, de Instituto Tomie Ohtake. Kun sidejo en San-Paŭlo, ĝi havas la oficialan celon disvastigi, pere de eksponadoj, lernlaborejoj kaj kursoj, la grandajn ŝanĝojn okazintajn ekde la 1950-aj jaroj ĉe plastikaj artoj, arkitekturo, *design* (projektarto), oportunigante pririlatajn meditojn, kaj prezentante la plej novajn estetikajn tendencojn en la mondo.

Famo kaj vastkonata kariero neniam ŝanĝis la defion kiun Tomie Ohtake difinis al si: ĉiam reelpensi. Ĉi tiu nekomuna, renoviga kapablo de la artistino manifestiĝis en malsamaj fazoj de ŝia pentrado kaj komponado de artfiguroj kaj skulptaĵoj; nuntempe, ŝi pligrandigas sian tridimensian artproduktadon. Per tio, ŝi longdaŭre ĉarmas la publikon ĝis hodiaŭ. ■

**Famo kaj vastkonata kariero neniam ŝanĝis la defion kiun Tomie Ohtake difinis al si: ĉiam reelpensi.**

# Wangari Maathai

# Por daŭropoveco, demokratio kaj Paco

Josué Bertolin

En Kenjo arbo iĝis simbolo de la lukto favore al demokratio, al Paco kaj al protektado de la afrika kulturo. Tio ŝuldiĝas al la laboro de **Wangari Maathai**, elektita "Virino de la Jaro" en 1983. Naskiĝinte en distrikto Nyeri en tiu lando, la 1-an de aprilo 1940, ŝi ŝanĝis en realon tion, kio ŝajnis utopio al la kenja popolo: plibonigi ties vivkvaliton. Travivante infanecon en rekta kontakto kun la Naturo, kun la paso de la tempo ŝi ekrimarkis la detruadon de la biologia diverseco kaj la malpliiĝantan kapablon de la arbaroj por akvokonservado, kaŭze de la malbona administrado de la naturrimedoj kaj de la invado de verdaj areoj kun la celo starigi komercajn plantejojn, tiel malfaciligante postvivadon en sia lando.

Diplomiĝinte pri Biologiaj Sciencoj ĉe Mount St. Scholastica College, en Kansaso (Usono), kaj estiĝinte majstro ĉe Universitato de Pittsburgh, Wangari estis la unua virino el Afrika Centro-Oriento serĉi doktoriĝon, ricevante diplomon de Ph.D., en 1971, de la Universitato de Najrobo. En ĉi-lasta ŝi lekciis pri Veterinara Anatomio kaj, en 1976, fariĝis estrino de la departemento de tiu lernobjekto — posteno neniam antaŭe okupita de virino.

Ankoraŭ en 1976 ŝi komencis forte aktivi en la Nacia Konsilio de Virinoj de Kenjo. Surbaze


Informado

de tiu agado, ŝi starigis la *Green Belt Movement* (Movado Verda Zono), en 1977. La virinoj, kiuj respondecis pri livero de la bazaj bezonoj de siaj familioj, estis la unuaj konstati la damaĝojn al la medio, frontante la malfacilojn plenumi siajn sociajn funkciojn pro la malabundo de nutraĵoj. Rimarkante tion, la "Virino de la Mondo" jaro 1989, ne ektimis antaŭ la defio ŝanĝi la historion de la okazaĵoj, kio igis ŝin, en 2004, la unua afrikanino gajni Nobel-premion pri Paco, pro ŝia kontribuo al daŭropova disvolviĝo, demokratio kaj Paco.

Dum ĉirkaŭ 30 jaroj da laboro, Wangari Maathai kaj la Movado Verda Zono ne nur helpis samlandaninojn planti 30 milionojn da arboj — kiuj liveris brulmaterialon, nutraĵojn, ŝirmejojn, oficojn kaj plibonigon de grundoj kaj de hidrografiaj basenoj, tiamaniere reduktante malriĉecon, solvante medi-problemojn kaj respondante al la bazaj bezonoj de la familioj —, sed ankaŭ montris sin kapablaj ŝanĝi la ideojn pri malsupereco trafintajn la samlandanojn, altigante ilian memestimon.

La Movado Verda Zono zorgas pri la afrika, kultura heredaĵo, tial ĝi celas pluteni la tradiciojn, respektas ĉiuregionan biodiversecon kaj kunlaboras por antaŭgardi la naturajn semojn kaj medicinajn plantojn.

En 2002, membroj de tiu movado, organizacioj de la civila socio kaj la kenja popolo kapablis starigi pacan transiron al demokratia registaro. En tiu sama jaro, profesorino Wangari estis elektata por la Parlamento per frapega 98 percento el la voĉdonoj. Post tio, ŝi estis nomumita asistministrino pri Medio, Naturaj Rimedoj kaj Sovaĝa Vivo, ĉe la 9-a Parlamento de Kenjo, posteno kiun ŝi ekzercis ĝis 2007. Al la paca batalado por la revigligo de la arbaroj ŝi aldonis la lukton por neniigi la eksteran monŝuldon de la malriĉaj landoj.


Dum ĉirkaŭ 30 jaroj da laboro, Wangari Maathai kaj la Movado Verda Zono ne nur helpis samlandaninojn planti 30 milionojn da arboj — kiuj liveris brulmaterialon, nutraĵojn, ŝirmejojn, oficojn kaj plibonigon de grundoj kaj de hidrografiaj basenoj, tiamaniere reduktante malriĉecon, solvante medi-problemojn kaj respondante al la bazaj bezonoj de la familioj —, sed ankaŭ montris sin kapablaj ŝanĝi la ideojn pri malsupereco trafintajn la samlandanojn, altigante ilian memestimon.



informado



Photo © Tora Martens


Jornal de Brasília
PAIVA NETTO
Haiti comove o mundo

Legio de Bona Volo kaj ĝia direktoro-prezidanto kondolencas la familion de la karmemora d-ino Zilda Arns, kiu revenis al la Spirita Patrujo la 12an de januaro (viktimo de tertremo kiu ruinigis Haition). Per artikolo publikigita en centoj da gazetoj, revuoj kaj TTT-ejoj, enlande kaj alilande, sub la titolo "Haitio emociigas la mondon", la ĵurnalisto Paiva Netto faris simplan omaĝon al ŝi kaj al miloj da mortintaj homoj en la tragedio. En la artikolo li reliefigas: "*Kiel gvidanto de la* Pastoral da Criança *(Misio por la Infano), Zilda Arns realigis mirindan laboron por ensocietiĝo ĉe zonoj de malriĉeco disigitaj tra Brazilo kaj alilande*".

# Omaĝo al Zilda Arns

**Viktimo de la tertremo en Haitio, 75-jaraĝe, la kara kuracistino kaj brazila sanitaristino revenis al la Spirita Patrujo dum misia laboro realigata en Karibo.**

Infankuracisto kaj sanitaristo, d-ino **Zilda Arns Neumann** naskiĝis en la brazila urbo Forquilha/SC, en 1934. Ankoraŭ junaĝe ŝi sentis naturinklinon al bonstato kaj bonfarto de homoj kaj ŝi diplomitiĝis pri Medicino ĉe Federacia Universitato de Paraná. Ŝi laboris kiel infankuracisto en la Hospitalo por Infanoj Cezar Pernetta, en Curitiba/PR. Kiel faka direktoro de la Bonfara Asocio Sara Lattes, ŝi organizis patrin-infanan sanservejojn, klubon por patrinoj, trejnis provinstruistinojn kaj provkuracistojn. D-ino Zilda fakiĝis pri socia infankuracado kaj pri publika sano. En 1997, kun kvin filoj ankoraŭ infanaj, ŝi vidviniĝis.



Arkivo BV

La ĉefgvidanto de LBV akompanas la kardinalan moŝton **Paulo Evaristo Arns**, emerita ĉefepiskopo de San-Paŭlo, frato de la karmemora d-ino Zilda Arns, dum lia vizito al la eduka centro de Legio de Bona Volo, en la ĉefurbo San-Paŭlo, en 1988.

Ŝi dividis sian tempon inter la hejmaj taskoj, la publika servado kaj sia konsultejo, funkcianta ĉe vesperiĝo en la malantaŭ parto de la hejma korto. Du jarojn poste, ŝi kunordigis, en la ŝtato Paraná, la Internacian Jaron por Infano apoge de Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Infaneco (Unicef) kaj Ministrejo pri Sano.


Danke al sia sperto, en 1980 ŝi estis invitita kunordigi la kampanjon por vakcinado Sabin, cele kontraŭbatali en sia ŝtato la epidemion de infana paralizo. En 1983 ŝi fariĝis la fondinto kaj nacia kunordiganto de la *Pastoral da Criança* [Misio por la Infano], organizo de la Enlanda Konferenco de Brazilaj Episkopoj (CNBB, portugale), kiu flegas gravajn bazajn laborojn kontraŭ infanmortoj. La ideo por kreo de la *Pastoral da Criança* estiĝis dum neformala parolado inter **James Grant**, tiama plenumdirektoro de Unicef, kaj lia moŝto **Paulo Evaristo Arns**, frato de d-ino Zilda kaj emerita ĉefepiskopo de San-Paŭlo.




# Ekvacio de Amo

## Ekumena Edukado + Solidareco + Socipovigo de Virino

Suelí Periotto




Suelí Periotto*, direktorino de Instituto pri Edukado de LBV

En sia plimulto ili estas tre junaj. Simplaj rigardoj, tamen esprimriĉaj rigardoj, plenaj je la lumo de tiu, kiu posedas la naskpovon. La grupo estas kunigita por io speciala: en la studio de la Supera Reto Bona Volo de Radio (kiu afable disponigis la spacon), ili registras muzikon, kies tekston kaj melodion ili komponis dum la Kurso por Gravedulinoj de la Programo *Civitano-Bebo*, disvolvita de Legio de Bona Volo en sia Komunuma Centro, en la ĉefurbo de la subŝtato San-Paŭlo.

La iniciato, kiu havas tutan interplekton en Brazilo kaj en eksterlando, destiniĝas al orientado

* Suelí Periotto estas prelegantino, post-diplomita pri Lerneja Mastrumado kaj Metodologio pri Homaj Sciencoj kaj prezentantino de la programo *Edukado sub Debato*, de la Supera Reto Bona Volo de Radio.

kaj apogo al virinoj ekde la gravedeco ĝis la unua jaraĝo de la bebo, celante sanan gravedecon kaj kontraŭbatalon al infana-mortemo.

## La kanzono

*"Vi venis neatendite/ Kiel suno brilanta en mia vivo/ Mi deziras tion plej bonan al vi kaj al via estonteco"*, kantetas la estontaj panjoj. Kaj ili kompletigas: *"Kara infano, vi estu tre sana/ Mi volas esti bona patrino/ Iafoje mi timas naski mian bebon/ Dio donu al mi fortojn por flegi vin/ Via alveno plibonige ŝanĝis/ Niajn vivojn/ Via familio atendas vin kun amo, kareso kaj sindediĉo"*.

La milda kanto, rezulto el la muzikterapia laboro, bone esprimas la malfacilaĵojn venkitajn kaj la konsciencon akiritan laŭlonge de 11 kunvenoj, en kiuj ili partoprenis dum la unua labordaŭro de la programo kaj ĉe kiuj ili laŭgrade lernis temojn koncernajn al gravedeco kaj al infano, kaj same al siaj fizika, emocia kaj spirita bonfartoj. *"Ni realigis sonoran senteblecigon pri akcepto de tiuj beboj, kiuj venos en la mondon. Vidu, post kiam la beboj naskiĝos, ili plue havos kontakton kun tiu laboro pere de muziko"*, prikomentis la staĝantino **Juliana Alves Lima**, kiu laboris kiel volontulino en tiu iniciato.

La socia asistantino **Iara Pereira da Silva** klarigas: *"La kurso havas kiel celon ebligi al la infano esti akceptita en hejmo kun multe da amo, kompreno kaj harmonio, tiel ke la personoj ĉiam povu kontente ricevi novan vivon"*.

Ŝi diras, ke oni formas plurajn grupojn dum la jaro kaj ke, en la unua periodo de la *Civitano-Bebo*, virinoj havantaj kvar aŭ kvin monatojn da gravedeco, en situacioj de damaĝebleco aŭ de socia risko, enskribiĝas kaj komencas ĉeesti prelegojn pri temoj kiel "Fekundiĝo kaj la disvolvo de feto"; "Graveco de nutrado dum gravedeco"; "Familia planado"; "Deprimo dum gravedeco kaj post akuŝo: kiel eviti"; "Konsiloj kaj zorgoj pri la bebo"; kaj "La graveco de mamnutrado", temoj pliriĉigitaj de la Ekumena Spiritualeco, grava diferencigo en la agado.

## Prelegoj kaj edukaj dinamikoj

La kunvenoj ĉe LBV komenciĝas per ekumena preĝo. Poste, oni faras sesion de muzikterapio kun pritrakto de unu el la supre cititaj temoj, pere de prelego aŭ de dinamiko. La gravedulinoj ricevas kestojn kun nutraĵoj kaj bebvestaron.

La naskiĝo de infano signas la finon de la unua etapo. Tiam la socia asistantino kaj iu flegistino iras al la domo de la nova patrino por vidi kiel ambaŭ fartas. Dum tiu vizito oni donas al ŝi kalendaron por ke ŝi eniru la duan etapon, tiun de la "grupo de patrinoj", en kiu la pridiskutotaj temoj pli koncernos al sanstato de infano, evito de hejmaj akcidentoj, zorgoj pri nutrado kaj ankaŭ pri tio: kiel prilabori la memestimon de la patrino por ke ŝi oferu tion plej bonan el si al la infano. *"Ni kontrolas*


Daniel Trevisan

Usona volontulino (maldekstre) laborante ĉe LBV en San-Paŭlo/SP (Brazilo)


Rio de Janeiro/RJ (Brazilo)

Usono





Conceição de Albuquerque

Unu el la programoj starigitaj de LBV de Usono estas la *Ĝardeno de Bona Volo kaj de Paco*, plenumata en lernĉambro de usonaj, publikaj lernejoj (fotoj maldekstra kaj supra, kun la revuoj *Tutmondigo de la Frata Amo* kaj *Paco por la Jarmilo*, LBV-publikigaĵoj senditaj al UN. La Juna Legianino Mariana Malaman (maldekstre) estas unu el la volontuloj, kiuj aplikas la aktivecon, kies celo estas formi kritikan rigardon kaj pripensi manierojn por diskonigadi Kulturon pri Paco.

*vakcinadon de infano, per ŝia karto, kaj ĉiumonate efektivigas pezadon kaj mezuradon, ĉiam orientante la patrinon pri konsulto al infankuracisto"*, plu diris Iara.

Kaj la rezultoj estas pozitivaj, kiel konsente opinias la nova panjo **Lucimara Aparecida Costa**: *"Mi estas tre feliĉa, plaĉis al mi sekvi la kurson, mi lernis multajn aferojn kaj ĉion, kion mi lernis, mi portas hejmen"*.

La socia asistantino Iara konkludis: *"Oni emas ĉiam trakti la personojn plej karese por ke oni ĉiutage konkretigu la idealojn de LBV"*.



## Programo estigas labordungon kaj rentumon

En Ribeirão Preto, internlanda urbo de ŝtato San-Paŭlo, la Institucio konkretigas projektojn, kiuj celas krei kooperativojn kaj asociojn por oportunigi oficojn en malplej favorataj komunumoj.

Inter la rakontoj pri sukceso estas tiu de la Asocio de Manlaboristaj Virinoj "S-ino Sebastiana da Silva Terra", en la kvartalo Maria Casagrande, al kiu konstante aliris virinoj kun malsamaj historioj, kunvenintaj, pere de la LBV-programo por kunvivado, por trovi manierojn por favori mongajnon. La asocio faris servojn al presejoj en la regiono, produktante sakojn por butikoj, skatolojn kaj aliajn kartonaĵojn. La kreskanta nombro da mendoj motivigis al LBV, kunlige kun Sebrae (Servo Brazila por Apogo al Mikro kaj al Malgrandaj Entreprenoj),



Fotoj: Arkivo BV

Porto (Portugalio)



Buenos Aires (Argentino)



Arkivo BV

La Paz (Bolivio)

Teresina/PI (Brazilo)


Erineu Fernandes

realigi kursojn por plibonigo de la kvalito de servoj kaj por scio pri laŭleĝaj devoj.

Tiu kooperativo kreskis kaj, post pligrandigo de la kadro de partoprenantoj, anstataŭe al ĝi oni fondis entreprenon: AB Fomm Comércio e Confecções de Embalagens (Komerco kaj Fabrikado de Pakaĵoj). *"Nia komunumo, en ĝeneralaj trajtoj, perdis tiun almozpetan karakteron. Multaj serĉis tion serĉendan kaj kreskis, elvolviĝis. Mi trarigardas ĉi tiun tutan laboron kaj restas ravita, dankanta al Jesuo, al Frato Paiva Netto kaj al nia amata LBV"*, rakontas **Eunice da Silva Terra**, kiu estis kunordigantino de la asocio kaj respondecas pri la nuna entrepreno. Hodiaŭ, AB Fomm partoprenas la labormerkaton kaj jam ŝanĝis la situacion de dekoj da familioj.


Domingos Tadeu/Palácio do Planalto

"Inter ĉiuj tiuj aktivecoj de Legio de Bona Volo mi vidas unu kiu ŝajnas al mi, kiel ĵurnalisto, la ĉefa: LBV debatas naciajn kaj internaciajn problemojn, provas konsciencigi la civitanojn pri iliaj devoj. (...) Mi esperas ke tio multobliĝos."

**Carlos Chagas**
Ĵurnalisto, universitata profesoro, komentariisto de radio kaj TV kaj reportero ĉe elstaraj, brazilaj gazetoj.

La agoj de LBV celas krei spiritualigitan konsciencon preparitan por fronti la grandajn defiojn de la jarmilo, surbaze de la Nova Ordono de Jesuo, la Ekumena Kristo: *"Vi amu unu alian, kiel Mi amis vin. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj"* (Evangelio laŭ **Johano**, 13:34 kaj 35). ***"Ni trovis ĉe LBV la valorigon de la Homa Estulo kaj de ties eterna Spirito***

"Nia komunumo, en ĝeneralaj trajtoj, perdis tiun almozpetan karakteron. Multaj serĉis tion serĉendan kaj kreskis, elvolviĝis. Mi trarigardas ĉi tiun tutan laboron kaj restas ravita, dankanta al Jesuo, al Frato Paiva Netto kaj al nia amata LBV."

**Eunice Terra**
Virino asistata de LBV


Adelar Pereira

Uberlândia/MG (Brazilo)



Arkivo BV

Goiânia/GO (Brazilo)



João Preda

***por ke ĉiu eltiru el si la plej grandan potencialon kaj ĝin almetu al la servo de la komunumo kaj de si mem. LBV plenkredis je nia deziro kaj ni sukcesis trafi la celon"***, diras Eunice, emociita.

## Sinjorino venkas deprimiĝon kaj la volon memmortigi

Eunice da Silva Terra klarigas ke *"LBV fariĝis ponto sur kiu tiuj virinoj laboras, plibonigas siajn kapablojn kaj poste iras serĉi aliajn oportunojn"*.

Laŭ ŝia opinio, la granda kontribuo proponita de LBV estas alporti la emocian ekvilibron al tiuj homoj. ***"Okazis kazo de 61-jaraĝa sinjorino, kiu venis ĉi tien kun multaj familiaj problemoj, postvivinta al kvarfoja provo memmortigi. Ŝi estis en profunda deprimo, en bedaŭrinda situacio, sed post tri tagoj ŝi jam kantetadis la muzikojn, kiujn ni aŭdis per Super Reto Bona Volo de Radio**. Ŝi iom post iom pliboniĝis ĝis kiam ŝi sukcesis oficlaboron; ŝi eliris el ĉi tie kun alia sinteno. Kaj tio ordinare okazas al aliaj personoj kun financaj kaj geedzecaj problemoj, kiuj transformiĝas post ĉi tiea vizitado. Ni restas kun sopiroj, sed la celo estas servadi kaj sekvi antaŭen"*, rakontas Eunice.

## Dommastrinoj

Asertas Paiva Netto: *"**Ne estas plibona financisto***



Arkivo BV




Montevideo (Urugvajo)

Arkivo BV



Arkivo BV

Belo Horizonte/MG (Brazilo)



Pedro Reis

Cuiabá/MT (Brazilo)

## Agendo: Kvina Monda Urba Forumo

La urbo Rio-de-Ĵanejro gastigis, de la 22a ĝis la 26a de marto, la ĉefan mondan eventon pri urboplanado. Realigata de la Programo de Unuiĝintaj Nacioj por Homa Loĝigado (UN-HABITAT), la Kvina Monda Urba Forumo (WUF5, angle) pritraktos alternativojn, socie kaj medie daŭrepovajn, por subteni komunumojn kaj urbojn, kun la celo havigi adekvatan loĝadon, puran akvon kaj sanigadon por ĉiuj, kaj ankaŭ garantii urban kreskon kaj disvolvon, ekologie kaj prudente.

Per intervjuo al revuo BONA VOLO, la ĝenerala subsekretariino de UN kaj plenumdirektorino de UN-HABITAT, d-ino **Anna Kajumulo Tibaijuka**, substrekis la elekton de la brazila urbo kiel gastiganto de la forumo. Laŭ la agendo, ŝi menciis, ke ŝi vizitos favelojn en kiuj Legio de Bona Volo ankaŭ plenumas asistadon.


Eduarda Pereira

Plenumdirektorino de UN-HABITAT, d-ino Anna Kajumulo Tibaijuka, intervjuiĝas por BONA VOLO, dum Kunsido de la Supera Instanco de Ekosok, en julio 2009, Ĝenevo (Svislando).

***ol familiestrino**, dommastrino kiu devas prizorgi siajn idojn multefoje per eta buĝeto, farante verajn miraklojn pri kiuj ni ĉiuj estas atestantoj, disde la plej influa ministro pri Financoj ĝis la plej simpla civitano."* Ĉi tiuj vortoj de la la direktoroprezidanto de LBV, el lia mesaĝo (paĝo 4 de ĉi tiu eldono), trafe resumas kiel grave estas ellabori agadon favoran al tia pligrandiĝanta publiko. Studoj de Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko (IBGE, portugale) indikas, ke la nombro da familiestrinoj kreskis 79 percento inter 1996 kaj 2006 en Brazilo.

Ankaŭ en Portalegro/RS, Brazilo, grupo da virinoj kreas alternativojn por enspezigoj kaj kontribuas por doni al tiaj batalantinoj emocian apogon, ilin helpante en la plena ekzercado de ilia civitaneco. Tie LBV akiris riĉohavan sperton, per kiu kareso kaj Solidareco estas la ĉefaj rimedoj. Grupa praktikado — dinamikoj, prelegoj kaj provlaborejoj por manlaboroj — kaj individuaj helpkonsultoj estas farataj.

La sciigoj de tiuj virinoj parolas per si mem. **Laura Gonçalves**, el la kvartalo Santa Tereza, tre nature diras, ke ŝi lernis *"en LBV labori kun Bona Volo"*, dum ŝi partoprenas en kursoj pri pentrado kaj pri telertukoj. *"Krom lerni aferojn, kiuj helpas min subteni mian familion, mi sentas min komfortigita ĉe tiaj aktivecoj, kia la preĝo kiun ni eldiras antaŭ la kunveno. Tio helpas min, vigligas mian volon*


Clayton Ferreira

Manaus/AM (Brazilo)


Arkivo BV

Olinda/PE (Brazilo)



Arkivo BV

*ĉiutage venki, ĉar mi havas du filojn kun sanproblemoj. Mi ĉiam ĝoje stariĝas, sciante ke mi iros al LBV",* ŝi konkludis.

## La povo de preĝo

Alia propono de la Komunuma kaj Eduka Centro estas instrui reprofiti forĵetaĵojn, kiujn oni destinus al rubejoj, kaj ilin transformi en materialojn kun komerca valoro. **Maria Alcedina do Nascimento**, el la kvartalo Sarandi, en la urbo Portalegro, komentas pri tiu servo: *"Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenas la programon de LBV kaj lernadas. La kurso de mi plej ŝatata estas tiu pri reuzo. Mi jam havis multajn problemojn kaŭze de deprimo, sed post kiam mi ĉiusemajne venas ĉi tien mi kaj mia familio pli bone fartas, dank' al Dio kaj al la preĝoj kiujn ni ĉiam faras antaŭ la komenco de la lecionoj".*

> "Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenas la programon de LBV kaj lernadas. La kurso de mi plej ŝatata estas tiu pri reuzo. Mi jam havis multajn problemojn kaŭze de deprimo, sed post kiam mi ĉiusemajne venas ĉi tien mi kaj mia familio pli bone fartas, dank' al Dio kaj al la preĝoj kiujn ni ĉiam faras antaŭ la komenco de la lecionoj."
>
> **Maria Alcedina do Nascimento**
> Virino asistata de LBV

## Multobligante la agkampojn

En la brazilaj urboj Rio-de-Ĵanejro, San-Paŭlo, Braziljo, Kuritibo kaj Beleno, dum miloj da lernantoj lernas en la lernejoj de Legio de Bona Volo, iliaj patrinoj klopodas pergajni la ĉiutagan panon. En tiuj edukaj centroj estas forta la envolviĝo de la familianoj, multobligante la laborkampon de la Organizaĵo.

Ĉe la koro de la amazonia regiono, en Beleno/PA, la Porinfana, Eduka Lernejo Jesuo, subtenata de Legio de Bona Volo, ĉiutage akceptas cent gelernantojn kiuj vivas en situacio de socia risko. Ili estas knaboj kaj knabinoj kun aĝo de 3 al 6 jaroj, kiuj en tuttaga lernperiodo restas en etoso en kiu radias la etikaj kaj spiritaj principoj de la Institucio, celantaj konstrui vere solidaran socion. Tie la Pedagogio de Amo, renoviga propono de la edukisto José de Paiva Netto, estas ankaŭ aplikata kun sukceso, disvolvante Cerbon kaj Koron.

En la lerneja universo, LBV faras sociedukan laboron kun familioj, rilatantan al ilia socia vivmedio. Ĉiumonate la gepatroj de la gelernantoj kunvenas por pridiskuti temojn kiel gravecon de la familia partopreno en lernejo, Infanan Edukadon, lernejon en la komunumo, buŝhigienon, antaŭprotektan dentologian edukadon, interalie.

Laŭ la LBV-lerneja direktorino, **Margarida Martins**, la rezultoj de tiu etendita laboro estas tre pozitivaj, ĉefe por patrinoj. Pro tio la profesiuloj de la pedagogia sfero prezentas tiajn temojn ankaŭ al la komunumaj lernejoj kaj lokaj asocioj, pliigante la bonajn rezultojn je miloble.

Disvolvante la individuajn kaj kolektivajn potencialojn de tiuj infanoj, la Organizaĵo konfirmas tion kion la popolo mem asertas: *"LBV naskiĝis por ami kaj esti amata".* (kursivoj niaj)

Fotoj: Arkivo BV




Curitiba/PR (Brazilo)




Goiânia/GO (Brazilo)



São Paulo/SP (Brazilo)



SPECIALA

# Hejma perforto kontraŭ virino

Photos.com


Arkivo BV

Sandra Fernandez, sociologino, Novjorko/Usono

En antaŭhistoria tempo la homo loĝis en kavernoj, ĉasadis por postvivi, komunikiĝis per gruntoj kaj gestoj. Primitiva socio. Jarcento 21: antaŭeniras tutmondiĝo, veturiloj brulmiksaj, satelitoj, interreto, asista homreproduktado... La listo de la videbla, teknologia progreso estas vasta kaj ne estas tempo nek spaco por listigi 10 percenton el ĉiuj konkeroj.

La du ekstremaj momentoj de la Homaro supre menciitaj, radikale malsamaj laŭ sintenado kaj kutimoj, estas apartigitaj de miloj da jaroj. Perforto povas esti karakterizata kiel unu el la plej malnovaj, sociaj manifestiĝoj kaj, preskaŭ ĉiam, ĝi estas kreskanta trajto de la kolektiva kaj de la individua sfero, precipe kun ŝtata kunkulpeco kaj kultura influo. Unu el la plej okulfrapaj perfortoj estas tiu praktikata kontraŭ virinoj, antikva sinteno kiu, malgraŭ la modernigo de kutimoj kaj la teknologia disvolviĝo, fariĝis komuna, sendepende de registaraj reĝimoj, religiaj moroj, lingvo, kulturo, akirpovo aŭ instrunivelo.

En Brazilo, je ĉiuj 15 sekundoj unu virino estas perfortata de sia kunulo.

Studoj realigataj en pluraj landoj, konduktitaj de Unuiĝintaj Nacioj, montras ke la nombro da krimoj praktikataj kontraŭ virinoj, infanoj kaj maljunuloj egalas al tiu rezultanta el militoj. En Brazilo, je ĉiuj 15 sekundoj unu virino estas perfortata de sia kunulo.

En 1993, en la urbo Vieno, Aŭstrio, dum la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, grava paŝo estis farata cele al la solvo de tiu konflikto. Perfortemo kontraŭ virinoj estis rekonata kiel atenco kontraŭ rajtoj. De tiam registaroj kaj organizita, civila socio laboras por elimini tiun malbonaĵon per pli severpunaj leĝoj.

Dum la Tutamerika Konvencio por Antaŭforigo, Puno kaj Elradikigo de Perfortemo kontraŭ Virino, ankaŭ konata kiel la Konvencio de Beleno el Parao, realigita de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAŜ), en 1994, oni difinis tiun tipon de perforto kiel *"iu ajn ago aŭ konduto bazita sur sekso kiu kaŭzas morton, damaĝon aŭ fizikan, seksan aŭ psikologian suferon al virino, tiel en la publika kiel en la privata sfero"*.

## Malsamaj kulturoj

La kerno de la rilatoj bazitaj sur estimo, konsistanta el personoj kiuj kunvivas en sama fizika spaco, estas io tre kompleksa por observado. Ĝi malsimilas laŭ naskiĝloko (Okcidento, Oriento, Mezoriento), politika reĝimo, kultura heredo (patriarka socio), religio, instrunivelo, regiono (urbo/kamparo) kaj aliaj aspektoj. Pri tio mi malfermas parentezon por klarigi ke nia koncepto pri hejma perforto estas okcidenta, tio estas, kiam regpovo estas ekzercata en la sino de la familio, de unu kontraŭ alia, per oftaj agresoj ĉu eksplicitaj aŭ implicaj. Ni ne povas forgesi, ke ni devas provi vidi aliulon laŭ ties okuloj, ĉar tio rigardata de kelkaj socioj kiel io natura, al aliaj estas krimo laŭ la lokaj kutimoj. Tio ne signifas, ke unu socio estas pli bona ol alia. La konfliktoj ja ekzistas. Kio malsamas, tio estas la rigardo, la vidpunkto uzata por ilin observi, sen forgeso pri la respekto, kiun ni devas havi unuj al aliaj, ĉar, kiel instruas la ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto, ni ĉiuj estas Homaj kaj Spiritaj Estuloj.

## Leĝo Maria da Penha

Diskutado altiris atenton sur la brazila scenejo: la Leĝo 11.340, de 2006, nomata Leĝo Maria da Penha, kiu kreis rimedojn por bridi kaj antaŭforigi hejman kaj familian perforton kaj disponigas pli severaj punoj kontraŭ malobeantoj, kiel prizono. Brazilo estas inkludata en statistikoj kiuj indikas, ke en Latinameriko kaj

en Karibio tia krimo trafas la virinan loĝantaron laŭproporcie de 25 percento al 50 percento. La decido de la brazila registaro krei la leĝon kontribuas por pliintensigi la diskutadon kaj stimulas ŝanĝojn en la landoj alcelataj de tiu esploro.

La Speciala Sekretariejo pri Politikoj por Virinoj disvastigis, ke de januaro ĝis decembro 2009, la Virina Informservo (telefonvoku 180) plenumis 401.729 vokojn. El la tutaĵo de tiuj alvokoj, 70 percento el la virinoj plendis pri ĉiutagaj perfortoj.

En Usono, laŭ National Organization for Women (NOW), ĉiutage po kvar virinoj mortas kaŭze de hejma perforto. Temas pri krimoj farataj de edzo aŭ amindumanto, entute 1.400 murdoj ĉiujare, laŭ FBI. La organizacio taksas ke en ĉiu jaro de 2 al 4 milionoj da virinoj el ĉiuj etnioj kaj klasoj estas submetataj al hejma perforto en Usono. El tiu sumo, 170 mil bezonas enhospitaligon aŭ urĝan asiston.

## Cikloj de perfortemo

La usona psikiatrino **Lenore Walker** akiris famecon en la jardeko 1970 kun sia tezo pri la cikloj de hejma perfortemo, kio helpis ŝin difini kiel sisteme funkcias la agresemo en la hejma sfero.

> Inter la studemuloj estas la konsento laŭ kiu virino havas grandan malfacilon rekoni la ekziston de cikloj de perfortemo en sia hejma vivo kaj rezistas konfesi ke "ŝia princo iĝis bufo".

En la plejmulto de la kazoj pri enhejma perfortado kontraŭ virinoj, la ciklo komenciĝas per streĉa periodo, en kiu akumuliĝas serio da konfliktoj, plenaj je insultoj kaj minacoj. Tiu sufero povas daŭri semajnojn, en la formo de mensa, emocia agresemo, kvazaŭ signante ke tio plej malbona estas venonta. Post tio, okazas la fazo de brutala ago, tra kiu ĉiuj premoj akumulitaj en la unua fazo rezultigas senkontrolan malŝarĝadon. La agresanto atakas la viktimon per ĉia speco de malicaĵoj: puŝfrapoj, pugnobatoj kaj piedbatoj. Oni kutime faras uzon el tiaj objektoj, kiaj botelo, bastono, feraĵo aŭ io ajn trovata ĉe la okazo. Poste komenciĝas la lasta fazo, tiu de miela tempo aŭ reamikiĝo, de malsaneca trankvilo, en kiu la kunulo petas pardonon kaj promesas ŝanĝi sian konduton, aŭ agas kvazaŭ nenio okazis. Rilate la viron, tiu montras



Photos.com

(Daŭrigota sur paĝo 49)

# Maria da Penha Justa kaj urĝa lukto

Regina do Nascimento kaj Valéria Nagy

La cearaanino **Maria da Penha Maia Fernandes** estas unu el la batalantinoj kiuj desegnas, en Brazilo, la trajektorion de la virinaj konkeroj. Emerita biofarmaciistino, nuntempe ŝi laboras en Asocio de Familianoj kaj Amikoj de Viktimoj de Perfortado (APAVV, portugale), donante ekzemplon pri kuraĝo kaj estante vivanta simbolo de la lukto kontraŭ hejma perforto.

En aŭgusto 2006 estis sankciita la Leĝo n-ro 11.340, kiu portas ŝian nomon kaj kiu bridas kaj antaŭforigas la hejman kaj familian perforton, krom enkonduki ŝanĝojn en la Kriminalan Kodon, en la Kodon de Kriminala Proceso kaj en la Leĝon pri Kriminalaj Ekzekucioj. *"Antaŭe multaj virinoj volis liberiĝi el la hejma perfortado kaj ne trovis rimedojn por tio. Ni havas la rajton vivi sen perforto"*, asertis Maria da Penha.





La batalantino Maria da Penha, kies nomo estas donita al la leĝo, kiu rigore punas perforton kontraŭ Virino, estas omaĝata de infanoj de LBV.

La dramo travivita de Maria da Penha fariĝis internacie konata en 1994, ĉe la lanĉo de la libro *Mi postvivis, nun mi povas rakonti*, de ŝi mem verkita, en kiu ŝi priskribas sian historion de lukto por justeco kaj kontraŭ la subpremo de la edzo. En 1983, per antaŭkalkulita intenco dufoje provis murdi ŝin la edzo, **Marco Antonio Heredia Viveros**, kolombiano havanta brazilan civitanecon, ekonomiisto kaj universitata profesoro.

Viveros estis libera dum 19 jaroj, tempodaŭro dum kiu la proceso estis en prokrasto pro efiko de apelacioj. Kiam la libro de Maria da Penha alvenis al la manoj de unu el la membroj de Centro por Justeco kaj Internacia Rajto (Cejil), en 1997, la kazo alprenis novan vojon. La organizo, pere de Latinamerika kaj Kariba Komitato por Defendo de Virinaj Rajtoj (Cladem), sciigis la aferon al Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAŜ). En la sekva jaro, la OEA-a Komisiono pri Homaj Rajtoj komencis enketi pri tiu kazo kaj pri asisto al virinoj viktimigitaj de hejma perforto en Brazilo. En 2002, estis realigataj du kunvenoj ĉe OEA, kiuj rezultigis prizonon de la agresinto.

En la opinio de la virino kiu inspiris la faradon de la Leĝo, tiu tuta klopodo povos tamen maltrafi sian ĉefan celon se ĝia enhavo ne estos diskonigata al la socio. Pro tio ŝi postulas de la komunikmedioj pli grandan envolviĝon kaj dankas al tiuj kiuj disvastigas ĝiajn principojn, kion ŝi cetere faris en la momento kiam ŝi eksciis pri la artikolo "Leĝo Maria da Penha", de la ĵurnalisto Paiva Netto, publikigita en januaro 2009 en centoj da gazetoj, revuoj kaj paĝaroj en Brazilo. *"Mi dankas al li pro la artikolo, mi tre ŝatis. Ĝi vekas en ĉiu virino, kiu havas vivon markitan de perforto aŭ nenion konas pri la leĝo, la volon plene informiĝi pri la afero. Se la familio estas sana, certe ĝi scias pri iu alia, kiu bezonas tian klarigon. Paiva Netto estas referenco; mi estas certa, ke Legio de Bona Volo estas loko, kie homoj laboras por la Bono. (...) Mi opinias, ke niaj spiritoj estas fratece ligitaj, kaj ni, kiuj laboras por paca idealo, por pli bona vivo al la Homaro, komprenas kion aliulo faras kaj admiras ties agojn"*, ŝi deklaris.

sin pli atenta, pli karesa, kaj faras donacon al la virino, kredigante al ŝi ke la okazintaĵo neniam ripetiĝos. Tamen, rekonkerinte la konfidon de la kunulino, la tuta proceso rekomenciĝas.

Laŭ d-ino Walker, tiu ciklo de perfortemo povas fariĝi malbona kutimo, kiu daŭras senfine, sen perspektivo de interrompo. Ne malofte, ĝi finiĝas per tragedio, kiel grava lezo aŭ eĉ kiel virinmurdo.

Inter la studemuloj estas la konsento laŭ kiu virino havas grandan malfacilon rekoni la ekziston de cikloj de perfortemo en sia hejma vivo kaj rezistas konfesi ke "ŝia princo iĝis bufo". Povas ŝajni ironie, sed la inversigo de la rakonto el la infana fablo bone ilustras kiom malfacila estas dispecigo de la imagemo, tio estas, konsenti ke oni faris maltrafajn elektojn kaj vidi profundan kaj belan senton reduktiĝi al ofendoj kaj doloro. Multaj virinoj surtronigas la maksimon *"malbone kun li, pli malbone sen li"*. Kiel pagi la luprezon? Kiel sola eduki la infanojn? Tio estas demandoj, kiujn oni malfacile respondas aŭ juĝas. Superregante kiun ajn alian senton estas la legitima maltrankvilo pri la infanoj, kio igas senfina tian kirladon de konfliktoj.

Per analizo de la nombroj pri enhejma perfortado kontraŭ virino, eblas observi ke tia praktiko ne vidas haŭtkoloron, rason aŭ socian klason. Ĝi ĉeestas en ĉiuj sociaj sektoroj, en domoj de riĉulo, instruisto, kuracisto, altoficisto ktp, tiel faligante la mistifikon laŭ kiu nur ebria malriĉulo estas perfortemulo.

## Lumo ĉe la ekstremo de la tunelo

Antaŭ la defio pritrakti tiel urĝan kaj delikatan temon, mi komprenis ke ne estas alia elirejo ol veki ĉiujn al konscienco pri plena civitaneco. Unu el la vojoj proponitaj de Legio de Bona Volo estas plivalorigo de virino pere de kampanjoj kaj programoj pri socia inkludo, favore al *"Edukado kaj Klereco kun Ekumena Spiritualeco por ke estu Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro por ĉiuj en la formado de la Planeda Civitano"*, devizo per kiu la Institucio signas novan horizonton. Homo instruita surbaze de la koncepto de plena civitaneco ne akceptos vivmanieron kiu ekskludas harmonion, komprenon kaj faciligon de dialogo.

Unu el la vojoj proponitaj de Legio de Bona Volo estas plivalorigo de virino pere de kampanjoj kaj programoj pri socia inkludo, favore al *"Edukado kaj Klereco kun Ekumena Spiritualeco por ke estu Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro por ĉiuj en la formado de la Planeda Civitano"*, devizo per kiu la Institucio signas novan horizonton.

Estas necesa kaj urĝa ĉiu klopodo de la socio por nuligi kaj elradikigi el la ĉiutagaĵojn kian ajn perfortemon. Se la viktimo estas virino, des pli urĝaj estas la klopodoj, ĉar ŝi estas agento por edukado de generacioj, kiu rekte influas la tenadon de la socia ordo.

En sia verko *Em Pauta* [Sur la Tagordo], p. 58, Paiva Netto rimarkigas: *"La rolo de Virino estas tiel grava, ke eĉ kun ĉiaj malhelpoj de la maskleca kulturo, neniu organizaĵo volanta postvivi – ĉu ĝi estu religia, politika, filozofia, scienca, entreprenista aŭ familia — povas rifuzi ŝian apogon. Nu, favorata de la Dia Inspiro, Virino estas la Animo de ĉio, estas la Animo de la Homaro, estas la bona radiko, la bazo de la civilizacioj, la defendo de la homa ekzistado. Kia patrino dezirus vidi sian filon mortinta en milito? Ve al ni, la viroj, se ne estus la klerigitaj, inspiritaj kaj prilumitaj virinoj!"*

Ĉu vi rimarkis, ke la la aŭtoro aljuĝas al la familia patrin-nukleo la statuson de organizacio? Ĉe la familio estas la komenco de la serio da ligiloj kiuj teksas la socion. Perfortema hejmo estigas anomaliojn. Ni devas mediti pri tio. Jen la defio.

# Konscienco por Paco

**Laŭ la specialistino pri Familia Rajto, enhejma perfortado estas la "plej granda vundo de la socio".**

Natália Lombardi kaj Charles Viana

D-ino **Maria Berenice Dias,** aŭtorino de *La Leĝo Maria da Penha ĉe Juĝisteco*, libro en kiu ŝi pritraktas la efektivecon de la Leĝo n-ro 11.340/2006, estas unu el la plej kompetentaj brazilaninoj sindonantaj al la batalo kontraŭ enhejma perfortemo. La advokatino, unua virino kun posteno de supera juĝisto ĉe la Kortumo de la brazila subŝtato Rio Grande do Sul, rakontas al BONA VOLO pri ŝanĝoj okazintaj ekde la proklamo de la leĝo.

Okupante nuntempe la nacian vic-prezidantecon de Brazila Instituto pri Familia Rajto (IBDFam), d-ino Berenice substrekas, ke malgraŭ perfortemo, multaj agresitaj virinoj riskas sperti karesrilaton kaj kredas pri ŝanĝo de la kunula sinteno kaj pri tenado de la familia strukturo, eĉ se tio signifas *"pagi tre altan prezon por la fizika kaj psika sano"*.

Aldone al tiu ĉi pligraviga faktoro, pluraj studoj videbligas la malfacilojn por lernado proprajn al infanoj kaj adoleskantoj kutimintaj ĉeesti enhejman agresemon; konsekvence ili ripetas pliajn studjarojn kaj ne povas forlasi lernejon en regula dato, krom la fakto, ke ili prezentas pli grandan tendencon ripeti dum maturaĝo la malbonan ekzemplon el la hejmo. *"Ili reproduktas vivstilon kiun ili spertas hejme. Ili trovos problemojn pri konduto en lernejo, envolviĝon kun drogoj kaj eĉ provojn sinmortigi"*, avertas d-ino Berenice.

La advokatino ne konsentas kun la sinteno de kelkaj patrinoj kiuj preferas ne denunci la agresinton, nome la edzon, trovante sin "katenita" al li, patro de ŝiaj infanoj. Laŭ d-ino Berenice, permesi ke tiuj vivu en malamikema etoso iagrade ankaŭ estas speco de perforto. Kaj ŝi faras peton: *"Ne almetu vin al bato; denuncu. Oni devas konsciiĝi pri tio (...) ĉiujn 15 sekundojn po unu virino estas viktimo de enhejma perfortado"*.

Rilate la kondutojn, klarigas la specialistino pri Rajto de Familio, *"la leĝo determinis 42 ordonojn, tiel registarajn kiel ne-registarajn, en la sferoj federacia, ŝtata kaj municipa. Nun virino registras la okazintaĵon kaj en 48 horoj la distrikta policejo direktas la kazon al koncernfaka juĝisto"*. Ŝi ankoraŭ klarigas ke ĉe la kreado de tiuj instancoj oni ne nur ordonas enprizonigon de la agresinto, sed ankaŭ ke estu al li psikologia akompano, celanta lian rehonorigon.

D-ino Berenice atentigas pri la graveco de tio, kunligi la punajn determinojn de tiu Leĝo kun la politikoj kiuj antaŭforigas enhejmajn situaciojn de agresado. Inspirita de la premiso de LBV pri valorigo de la Homa Estulo kaj ties eterna Spirito, por ke malpliiĝu la altnombraj kazoj de morala kaj fizika perforto, la advokatino asertas: *"La homoj iom post iom perdas sian ekvilibran referencon, ĉar ne ekzistas etika politiko kaj socio havanta kompromison pri Edukado. (...) Se ne estus la sektoroj atentaj al tiuj temoj, prezentantaj Solidarecon kaj socian kompromison, kiel faras Legio de Bona Volo, tutcerte ni estus en situacio multe pli malfacila"*.

Ĉe finiĝo de la intervjuo, d-ino Berenice aŭtografis ekzempleron de sia verko *La Leĝo Maria da Penha ĉe Juĝisteco* al la ĉefgvidanto de LBV kun jena mesaĝo: *"Karega majstro Paiva Netto, dankon pro via bela ekzemplo pri solidareco. Ĉirkaŭbrakon!"*




D-ino Maria Berenice Dias portanta la eldonaĵon n-ro 223 de revuo BONA VOLO

# Kunlaborante kun LBV, Vi helpas konstrui pli bonan mondon!




BANKO SANTANDER Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

BANKO HSBC Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24

**CENTRA SIDEJO:** Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo • Brasil • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • **ARGENTINO:** Calle José Mármol 964 • Boedo • Buenos Aires • CPA C1236ABL • Tel: (+5411) 4925-5000 • **BOLIVIO:** Calle Asunta Bozo Bistrot 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo 5951 • Tel: (+5912) 273-3759 • **USONO:** 20 Calumet Street • Newark/NJ • Zip Code 07105 • Tel.: (+1973) 344-5338 • **PARAGVAJO:** Calle Curupayty, 1452 c/ Mayor Bullo Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/03 • **PORTUGALIO:** Rua Alexandre Herculano, 355 • Freguesia da Sé • Porto • CP 4000-055 • Tel.: (+35122) 208-6494 • **URUGVAJO:** Av. Agraciada, 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790



GRUPO RIO TÓKIO / NARITA
A NOSSA HISTÓRIA É REALIZAR
OS SEUS SONHOS.
CR-V
A liberdade nunca teve tanto estilo.
Incomparavelmente incrível.
FIT
Pensado nos mínimos detalhes.
CITY
Exato para a vida na cidade.
Accord
Você nunca voou tão alto.
PROGRAMA Honda Conduz
(IPI E ICMS RJ E SP) CLIENTE ESPECIAL, ENTRE EM CONTATO COM NOSSOS VENDEDORES E AGENDE UMA VISITA.
NARITA: 3987-8871 - SR. SIDNEY
Consórcio Nacional Honda
TOTALMENTE SEM JUROS - ENTREGA GARANTIDA PELA FÁBRICA - MENOR TAXA DE ADMINISTRAÇÃO DO PAÍS - MAIOR CONSÓRCIO DA AMÉRICA LATINA COM MAIS DE 1,5 MILHÕES DE CLIENTES ATIVOS RESULTADOS DAS ASSEMBLEIAS E IMPRESSÃO DO BOLETO DE PAGAMENTO PELA INTERNET.
A MANEIRA MAIS BARATA E INTELIGENTE PARA PROGRAMAR A COMPRA DO SEU NOVO HONDA.
PARCELAS A PARTIR DE: 765,25*
HONDA
RIO TÓKIO
BOTAFOGO
Rua General Severiano, 201
21 2122-4999
www.riotokio.com.br
RIO TÓKIO
RECREIO
Avenida das Américas, 14.001
21 2323-9000
www.riotokio.com.br
NARITA
BARRA
Avenida das Américas, 2001
21 3987-8888
www.hondanarita.com.br
SE BEBER NÃO DIRIJA
O valor de R$ 765,25 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit 1.4 Mecânico 101 cv Flex 2010/2010 com valor de crédito de R$ 39.720,00. Reservamo-nos ao direito de corrigir possíveis erros de digitação. Ofertas válidas até a data desta publicação. Fotos meramente ilustrativas.